

Kontribuo al konferenco

5. Føroysk og norðurlendsk kvæði í altjóða eygum
(Feroa kaj nordaja balado en internacia perspektivo),
<http://ballads2015.fo>

RESUMO

Specifaj ecoj kaj funkcioj de baladoj – internacia riĉaĵo

Martin Strid, Dalekarlajo

La kontribuo esploras kiu estas la specifaj trajtoj de feroaj baladoj kaj skizas eblon ke tiuj fariĝu nova parto de tutmonda kulturo.

La ritmaj ecoj de feroa balado igas la dancon pli interesa por la dancantoj, kio eble kontribuis al ĝia travivado kaj forta pozicio ĝis moderna tempo. Tipa balado taktas unubate (1/4). En du trionoj el la feroaj baladoj la nombro da taktobatoj en ĉiu strofo estas malpara nombro kaj en duono ĝi estas primo. Plej oftas nombroj 29 kaj 31. Per tio la strofo neniam povos "ebeni" kun la danco, kiu havas ses paŝojn.

La taktaj modeloj de sesdek feroaj baladoj (ankaŭ danaj) kaj kelkaj aliaj nordajaj kantoj estas komparataj. Malpara nombro da batoj ŝajnas pli oftaj inter pli aĝaj baladoj. Sveda popolmuziko havas pli paran taktomodelon ol feroaj baladoj, sed unuopaj periodoj en malnovaj pecoj povas havi malparan nombron da taktomezuroj.

Granda parto de la teksto de balado konsistas el ripeto, pro tio facilas kunkanti. Ofte la rekantaĵo estas la pli granda parto de ĉiu strofo. Krome la rekantaĵo povas mem ripeti kelkajn vortojn, ĝis sep takteroj, sed plej ofte ses aŭ kvar. Eĉ tutaj, aŭ partoj de,

strofoj povas reveni. Ankaŭ la melodio emas reveni al similaj tonaroj. Ĉio tio kontribuas al la sugestia karaktero de la baladdanco. Plej oftaj longoj de tonaroj en la esploritaj baladoj estis 14, 7 kaj 16 takteroj respektive.

Estas dirite ke la feroa lingvo travivis sub fremda reĝimo parte danke al la balada danco. Je komparo inter Feroaj Insuloj kaj Dalekarlajo tiu aserto aspektas verŝajna. La kapablo de balado esti "fortikaĵo" por lingvo uzeblas ankaŭ por aliaj lingvoj. Unu tia lingvo estas esperanto, kies parolantoj estas maldense disigitaj en pli ol cent landoj.

Dum jaro 2014 kelkaj feroaj baladoj tradukiĝis en esperanton. Tiu ĉi lingvo havas altan kapablon sekvi la tekston de la originalo tre proksime, kaj enhave kaj ritme kaj rime. La kvin unuaj tute tradukitaj baladoj estas la parto Forĝisto Regin de Sigurda Balado, Drako Longa, Bresta Balado, Vilmunda Balado kaj Sigmunda Balado Malnova. Por komparo unu el ili tradukiĝis ankaŭ en la svedan kaj en dalekarlan, tamen sen sciencaj konkludoj.

Balado povas plenumi plurajn funkciojn samtempe; pli fortan socian kuneston, lingvekzercon kaj historian edukon. Dum la traduka laboro naskiĝis la penso verki novajn baladojn pri herooj de la esperantomovado. Estas donataj dek konsiloj pri ecoj de tiaj baladoj kaj ekzemploj je verkado. La unua el ĉi

tiuj internaciaj novaj herobaladoj laŭ
feroa modelo temas pri Valdemaro
Langlet (1872-1960). La balado
sekvas malnovan taktomodelon kun
29 batoj en ĉiu strofo el kiuj 15 estas
en la rekantaĵo. Kaj Bresta kaj

Valdemara baladoj kantiĝos en
baladdanco en mondkongreso
unufoje en la fino de julio 2015.

(22+70+40+77+56+62+89=416
vortojn)

Specifaj ecoj kaj funkcioj de baladoj – internacia riĉaĵo

Ĉu tradicio el pratempo, kiu travivis en angulo periferia de Eŭropo, povos fariĝi parto kaj eĉ grava riĉaĵo de nova kaj tutmonda kulturo?

verkab Martin Strid, Dalarna, Svedajo, inĝeniero diplomita kaj popolmuzikisto, inventinto de tonsilabado, redaktanto de Norda Kantaro.

Enhavo

Resumo.....	1
Specifaj ecoj kaj funkcioj de baladoj – internacia riĉaĵo	3
1. Persona rakonto.....	3
2. Taktaj trajtoj de balado.....	4
3. Ripetoj en balado	6
4. Komparo kun ludpecoj	8
5. Tonamplekso	9
6. Baladoj fortigas lingvon.....	10
7. Paralelaj tradukoj	11
8. Novaj baladoj	11
9. Kelkajn vortojn pri verkado.....	13
10. Referencoj.....	14
Aldono 1-a. Kompara tabelo	16
Aldono 2-a. La baladoj tonsilabe	21
Aldono 3-a. Tonsilabado	27
Aldono 4-a. Strofa kaj tonara longoj	29
Aldono 5-a. Bresta balado	30
Aldono 6-a. & Valdemara balado:	38

1. Persona rakonto

Multo el tio kion mi diros povos aspekti banala al iu kiu, kontrastub mi, dediĉis al feroaj baladoj akademian studojn kaj profesion esploradon. Sed eble parto de mia prelego enhavas novaĵojn ankaŭ al tiuj aŭskultantoj.

Feroaj baladoj fascinis min ek de kiam mi studanto en Gotenburgo en jaro 1978 okazanis ke feroano kondukis en popolmuzika domo ĉendancon. En biblioteko saman jaron mi elserĉis malnovan libron kun Sigurda balado (Sjúrðarkvæði), presita en 1822, la partojn kaj Forĝisto Regin (Regin smiður) kaj Brinhilda ŝnurero (Brýnhildar táttur). Mi ne komprenis la tekston, sed sciis ke iam en estonteco mi ekscios kaj tradukos ĝin, eble en la svedan sed certe en la espan, kiun mi tiam ankoraŭ ne sciis sed jam decidis ke mi lernos – kion mi faris kvin jarojn poste. Mi faris fotostatajn kopiojn de la teksto en formato granda (A3), grava kosto por studanto en tiu tempo.

La kopioj poste sekvis min en ĉiuj jaroj ĝis 2014, kiam finfine mi komencis traduki baladdancojn. La unua baladdanco estas Sinklara kanto (Sinklarvisa), kiun mi pretigis dum kelkaj tagoj (en libertempaj horoj). Sed poste, kiam mi ek entreprenis na Forĝisto Regin, mi bezonis lingvan helpilon. Unue mi apogis min je la vortaro Färöord (Ferovortoj), kiu troveblis en la komunuma biblioteko kaj kiun mi pruntis re kaj re kaj denove re. La melodion mi estis trovinta pli frue, sed nun

trovis pli da variantoj rete, kaj iom alian tekston. Kiam mi kunmetis ambaŭ tekstovariantojn (el feroaj Fluinsulo kaj Sudinsulo) mi ricevis version da 163 strofoj.

Post Forĝisto Regin mi daŭrigis per Drako Longa (Ormurin Langi), Bresta balado (Brestiskvæði), Vilmunda balado (Vilmundskvæði), Sigmunda balado pli malnova (Sigmunds kvæði eldra) kaj kelkaj pli, kiuj ankoraŭ ne pretas. Kelkaj el la tradukoj havas pli da strofoj ol la originalo. Tion kaŭzas ke iu strofo tradukeblis en du diversaj manieroj kaj ambaŭ estis bonaj. Mi certas ke samo okazis ankaŭ pri la originala teksto en pasinta tempo, ĉar ie kaj tie troveblas du aŭ tri strofoj sinsekve kiuj similas inter si sed havas malsamajn rimojn. Vidu ekzemple na Forĝisto Regin, NK 4401¹, strofojn '30-31 (&: Eystantil undir heygnum...), '80-81 (&: Smíða (skalt) tú mæz svørðið...) aŭ *91-92 (&: Báðar tekur?legði hann svørðslutirnar...), tradukite ('30,31 Oriente sub monteto kie ; knaboj...), ('80,81 Forĝu glavon vi por mi ; ... ; ambaŭ fendos mi per ĝi ...) kaj ('91,92 Ambaŭn prenas li glavpartojn ; ĵetas al lia ... ; tremis Regin... ; kiel...).

Mi mendis na Føroysk-dansk orðabók (Feroa-dana vortlibro) ĉar tiu kiun mi havis ne sufiĉis. En la pakaĵo de la librovendejo en Tórshavn kunestis eta broŝuro kun invitilo al ĉi konferenco. Pro tio mi estas ĉi tie nun.

Kial mi tradukas en esperanton? – Pro du kaŭzoj. Unue pro la kvalito de la traduko. Per esperanto oni povas sekvi la tekston de la originalo preskaŭ laŭvorte sen perdi rimojn kaj ritmon. (Mi tradukis ĉirkaŭ ducent kantojn de la skandinava, do mi scias pri kio mi parolas). Due pro avantaĝo demokratia, ĉar esperanto estas lingvo kiu apartenas al la tuta homaro. Ĝi travivis la epokon de la franca kiel internacia lingvo kaj travivos ankaŭ tiun de la angla.

¹ NK = Norda Kantaro, kanto n-ro 4401, vidu je <http://nk.tone.se>

2. Taktaj trajtoj de balado

Ekkompreni la ritmon de la baladoj daŭris iom da tempo. Sigurdan baladon kaj Drakon Longan mi vidis notitajn per muzikaj bildnotoj en dutakto (2/4) aŭ kvartakto (4/4). Ekzistas ankaŭ asertoj ke la ritmo alternas inter 2/4-kaj 3/4-takto, aŭ inter 3/4- kaj 4/4-takto. Laŭ mia opinio ĉio tio estas erara. Balado feroa estas **unutakta** (1/4). Permesu al mi klarigi kial.

La danco taktsilabeblas tiel:

#: <Dance> (Kv: li Li li Li De de)x

kie la rimarko <Dance> indikas taktsilabojn por danco, la ilumo [Kv] signifas baladdancan prenon, do ke oni tenas unu la manojn de aliaj en ĉena ringo, la taktsilabo [li] estas unu paŝo maldekstren, [de] unu paŝo dekstren, supra tonciklo [de, li] signifas maldekstran piedon, meza tonciklo [De, Li] signifas dekstran piedon kaj la kruco x signifas ke la tuta parentezo () ripetiĝas.

Kiam mi tonsilabigis la baladojn mi kalkulis la nombron da taktobatoj en ĉiu strofo, inkluzivub la rekantaĵo (niðurlag aŭ viðgangur). Montriĝis ke multkaze ĝi estas primo (23, 29, 31, 37, 41). En pli ol du trionoj de la trovitaj baladoj en la feroa ĝi estas malpara nombro. Vidu aldonon 4-an.

La baladoj kiujn enhavas aldono 4-a ampleksas kaj ĉiujn kantojn de Norda Kantaro, ĉapitro 44 Baladoj, kaj ĉiujn baladdancojn kiujn mi povis trovi interrete kun sonregistro el Feroaj Insuloj. La nombro da takteroj en ĉiu strofo staras en aldono 1-a, kolumno 12 (post dupunkto :) kaj en aldono 2-a (post dupunkto en pinta parentezo <:>).

Ni vidas en aldono 4-a, maldekstra parto, ke plej oftaj inter baladoj feroaj estas la primoj 29 kaj 31. La teksta strukturo de la 29-takteraj baladoj estas (7; 7; 15;) kie ĉiu "7-

taktaĵo" estas dividita en du vicoj kun longoj (4; 3) takterojn kaj la "15-taktaĵo" – la rekantaĵo – divideblas diversmaniere. Por 31-takteraj baladoj la struktura variado pli grandas.

Se oni komparas la melodion kun la danco, kiu havas ses paŝojn en ĉiu turno, oni vidas ke ili ne divideblas ebene. Certa loko en la strofo – certa vorto en la rekantaĵo – neniam paŝiĝas per la sama piedo en du strofoj sinsekvaj kaj nur ĉiun sesan strofon je la sama paŝo en la danco. Pro tio neniu taktero en la melodio estas pli "forta" aŭ pli "peza" ol iu alia taktero. Tion mi nomas 1/4-takto, tio estas unutakto.

Tio faras la dancon pli "malregula" ol ĝi estus se la nombro da takteroj por strofo divideblas per 6, aŭ eĉ per 2. Por komencanto tio povas igi la dancon pli malfacila por lerni, per tio ke ĝi paŝiĝas "sendepende" de la kantomelodio, sed en la longa daŭro mi pensas ke ĝi faras la dancon pli interesa por la dancantoj. Por doni klaron en ĉio tio **mi decidis tonsilabe meti la takton als same longa kiom la strofo** – kio iasence estas iom arbitra faro.

En certaj baladoj oni aldonas takteron en la kanton por havi malparan nombron da batoj, ekzemple la vorton "Ingur" post la rekantaĵo en Drako Longa. Kompare, oni povas vidi ke multaj svedaj baladoj, kaj malnovaj kantoj kaj pli modernaj kanzonoj baladstilaj, havas treigitan "duonigon" kun nombro da batoj por strofo kiu estas dividebla per 4, 8 aŭ eĉ 32.

Malon al la aldono "Ingur" en Drako Longa ni povas vidi en versio de Einars rima (Rimaro de Ejnar) registrita en Velbastaður en jaro 1959 kaj trovita je youtube.com. Tie la lasta silabo de la lasta vorto de la rekantaĵo daŭras du takterojn. Se ĝi daŭrus nur unu takteron, la balado havus la saman taktomodelon kian plej multaj primaj baladoj, per 29 takteroj el kiuj 15 en la rekantaĵo. Ĉi melodia versio cetere montras rimarkindan

variadon de strofo al strofo. Vidu aldonon 2-an.

Pli modernaj kantoj pli malofte havas malparan nombron da takteroj por strofo. En Jákupsa skegg (Barbo de Jakobo) la unua parto estas valso (3/4-takto) – kun du aldonitaj takteroj – kaj la dua parto ŝotiso, sed ambaŭ partas en la ĉendanco. Brúðarvísan (Novedzina kanto) kaj God nat og farvel (Bonan nokton kaj adiaŭ) iras, se oni tiel volas, tritakte.

El aldono 1-a oni povus eble konkludi ke la feroaj "primaj baladoj" estas malnovaj pli ol novaj. Tamen mankas al mi sufiĉaj scioj pri aĝo de la baladoj por fari statistikan analizon. Se oni komparas feroajn baladojn kun svedaj oni povas ankaŭ suspekti ke la takto en kelkaj malnovaj baladoj svedaj "parnombriĝis" en pli nova tempo.

La nove verkita Torsteins kvæði (Balado de Torstein) kun la rokmuzika grupo Týr komence sekvas la (7; 7;)-modelon por 29-taktaj baladoj, sed poste aldonas rekantaĵon da 22 takteroj (inkluzivub la paŭzo al sekva strofo) tiel ke la strofo fariĝas parnombra kun 36 takteroj. Se oni aldonus unu takteron la balado havus la saman taktomodelon kian Sigurda balado – kvankam kun alia disvicigo en la rekantaĵo.

En alia registriĝo de Týr, nurvoĉa, Nornagest rima (Sortulina rimaro) havas 54 takterojn en ĉiu strofo, kun malkutime longa kunligo inter la strofoj – lastan rekantatan vortsilabon daŭrub tri takteroj (#: La a h) – antaŭ la enkonduka (#: /MiMi) en sekva strofo. Se la paŭzo [h] foriĝus, ankaŭ tiu balado fariĝus prima per 53 takteroj. Oni povas miri ĉu tiu balado en malnova tempo estis malpartakta.

Se ni portas la suspekton pri malfrutempa "takta parigo" unu paŝon pli, ni trovas ke la danaj baladoj Ebbe Skammelsøn (Ebbe Skamelfilo) kaj Kong Sverke (Reĝo Sverke),

same kiel supre menciataj Einars ríma kaj Nornagest ríma, estus "primaj" se la longo de la lasta vortsilabo de la rekantaĵo mallongiĝus unu takteron. Baladoj kiuj "primiĝus" se la lasta tono anstataŭe longiĝus de unu al du takteroj estas Guttormsvísa (Kanto de Gutorm) kaj Flóvin Bænadiktsson (Flovin Benediktfilo). Per miaj nunaj scioj tamen mi ne povas pli ol divenaĉi ĉu tiel estis en pasinta tempo.

Ekzistas iom alieca ebla klarigo por la "prima fenomeno". Tiu estas ke la balado serĉas ne ĝuste primon, sed nombron kiu diferencas per unu taktero de dividebli per 6.

Matematike tio esprimiĝas tiel ke la nombro da takteroj

$$T = 6 \times N \pm 1$$

kie N estas natura nombro. Tiam anas ĉiuj primoj pli grandaj ol 3. La nombro T devas esti malpara kaj ne dividebla per 3, tio estas, ĝi ne povas ebeni kun la dancopaŝoj. El aldono 4-a ni tiam devus allistigi du feroajn baladojn (kaj unu svedan) kiuj havas 35 batojn por strofo (kaj unu svedan kun 25 batoj).

Alia fenomeno kiu apartigas baladojn de plej multaj modernaj kantoj kun ritme samformaj strofoj estas ke la nombro da silaboj por vico diferencas de strofo al strofo. Ni povas kompari ekzemple du strofojn² en de Sigurda balado la parto Forĝisto Regin:

(&: '34 Hjalprek kongurin ; tann jallsins son, ; hann fekk nú sær ; so høgborna konu.

'41 Hann vaks upp hjá síni moður, ; hon gav honum gangin hægst, ; hann royndi meira í ein mánað ; enn onnur børn í seks.)

Ne kalkulante la rekantaĵon (.....) strofo '34 havas dek naŭ silabojn, tio estas 19/14 = 1,36 silabojn por taktero, dum strofo '41 kun 30 silaboj havas 30/14 = 2,14 silabojn por taktero.

Balado rakontas dramecan kaj atentokaptan historion. La ŝanĝiĝanta denseco de silaboj

donas varian "kantorapidon" kiu kredeble ankoraŭ pli levas la intereson de la dancantoj pri la rakonto.

3. Ripetoj en balado

Aparta trajto de la malnovaj baladoj estas iliaj longecoj kaj la ripetoj kiuj igas al forta empatio – iu esprimis tion tiel, ke "fariĝas iaspeca medito" aŭ "oni preskaŭ entranciĝas".

La feroaj baladoj ripetas sin plurmaniere.

Unue la rekantaĵo kutime estas pli longa ol la "novvicoj", tio estas la rakonta teksto kiu ŝanĝiĝas de strofo al strofo. Tio faras ke ĉiuj dancantoj povas kunkanti en plej granda parto de la balado, negrave kiom malbone ili memoras la rakonton de la teksto. La nombro da takteroj en tiu rekantaĵo kiu kantiĝas sammaniere en ĉiu strofo staras en aldono 1-a, kolumno 11 (post la komo ,).

Due, la rekantaĵo ofte entenas en si mem ripeton. Alivorte, parto de la rekantaĵo kantiĝas dufoje en ĉiu strofo. Ekzemploj je tio estas en Sigurda balado "Griz' portis oron de l' sablo", en Vilmunda balado "Dancu mastrino", en la Sigmundaj baladoj "Norvegoj, dancu nun trankvile", "Forgesu ne min", "Mi paŝas gaje" "Dum bone staras tilio jen" kaj "Neniu kuraĝas tion venĝi" kaj en Balado de Greto "Nun falas frosto". La nombro da takteroj en tiaj ripetoj, en aŭ ekster rekantaĵo, staras en aldono 1-a, kolumno 10 (antaŭ la kruco x).

Trie, tuta aŭ preskaŭ tuta strofo povas ripetiĝi. Ekzemple revenas – krom tiel kiel estas menciata supre en ĉapitro 1, kvara alineo – en Forĝisto Regin³ la strofoj '21-23 ĉe '67-69 (&:'21 Regin forĝisto loĝas ; ĉe venonta flu' ; al li vi portu ; ĉi glavpartojn du.

² Strofnombrojn laŭ Norda Kantaro, NK 4401. Ĉi tiuj du strofoj estas ĉerpitaj el versio notita en Feroa Sudinsulo kaj presita en jaro 1822.

³ Versnummer enligt Norda Kantaro, NK 4401.

..... '22 Forĝu glavon li el ĝi ; brilan en fasono ; ambaŭn fendi povu ĝi ; feron kaj ŝtonon.
 '23 Akra nomiĝas drako ; kuŝas Brilerike ; Regin estas bona forĝisto ; perfidas li praktike.), strofo '75 ĉe '86 (&: '75 Estis juna Sigurd ; rajdas al pordo kabana ; Regin ĵetas forĝaĵojn ĉiujn ; kaj prenas glavon en mano.) kaj strofo '22 (vidu supre) ankaŭ en '81, '88 kaj '103. Foje oni povas kredi ke la kaŭzo estas nur bone trovita rimo, tiel kiel en Sigmunda balado malnova la strofoj '16 kaj '20 (&: *Rompas sin maro kiel grundoagres'* ; "*Tenu rekte al ... nes'*").⁴ aŭ la strofoj '29 kaj '54 (&: ... *fjord'* *kiel selkord'*).

Kvare, la melodio plej ofte enhavas ripeton aŭ similajn partojn. Kie samaj vortoj kantiĝas dufoje en sama strofo ili kutime kantiĝas sammelodie ambaŭfoje. Sed ni povas vidi ankaŭ aliajn ekzemplojn je rekanto, ekzemple en Gudbrandskvæði (Difajra balado – nomita laŭ norvega valo). Tamen unue faru ni rapidan lecionon pri tonsilabado:

- Tonsigno #: signifas komencon de tonsilaba peco, kun aŭ sen la nomo de la peco.
- La rimarko <1,7:33> diras ke la frekvenco de la takto estas 1,7 hercojn, tio estas ĉirkaŭ 102 batojn (takterojn) por minuto, kaj ke ĉiu takta mezuro (en ĉi kazo tuta strofo) havas 33 takterojn.
- Oblikva streko / estas takta streko.
- Ni uzas tonskalon de Zoltan Kódaly⁵ [Do Re Mi Fa So La Ti do], prenita post Guido de Arezzo. La tonsilaboj [do re mi fa] situas unu oktavon pli alte.
- Tonsilaba **vorto** estas unu taktero, tio estas unu paŝo en la ĉendanco.
- Ĉiuj vokaloj en taktero same longas.

⁴ "Nes" signifas malgolfo, tie estas terpinto etendiĝanta en maron.

⁵ Kodály (elparole Kodaj) (1882-1967), hungara komponisto, kreinto de pedagogia sistemo por muzikinstruado sonmemora.

- Punktokomo ; montras vicodisigon en la kantoteksto.
- %v estas temposigno nomata v.

Tonsilabado klariĝas pli detale en aldono 3-a. Nun re al Gudbranda balado:

(#Gudbrandskvæði: <1,7:33> /dodo doSo dore mi; mire %v redo doLa; dodo remi redo La;So dore mire redo; remi fa mire do; do %x doTi La Tido remi redo LaSo do mimoree do; remi fa mire do o %z)

Ek de la sesa taktero, do post la temposigno %v, venas tonaro da 14 takteroj ĝis temposigno %x. Post ĝi sekvas tre simila tonaro de %x ĝis %z. Per simila mi celas ke ĝi estas same longa, nombrub takteroj, kaj havas tonojn kiuj, takteron post taktero, pli-malpli similas. En ĉi kazo havas naŭ takteroj (substrekitaj) precize samajn tonsilabojn kaj la aliaj kvinuj parte samajn. Ni povas vortigi tion tiel ke tonaro 14-taktera faras du volvojn inter %v kaj %z.

En Runtsivalsstríðið (Batalo de Roncesvalo) ni samon vidas, ĉi foje per sep takterojn longa tonaro kiu faras tri volvojn inter la temposignoj %j-k-n-p:

(#Runtsivalsstríðið: <:29> (mimi %j /miimimi fami mire doLa; dodore miimi miimi; %k mido dore redo dodoLa; dore mimi mimi; %n mimore doTi LaSo La;La dore mimi mi; %p mido doore reedo dooLa do Ti La)

Ankaŭ la resto de la melodio (de %p ĝis sekvastrofa %j) kuŝas parte en la sama tonaro. Cetere ni povas vidi ke la melodioj de kaj Leivs kvæði kaj Viljorm Kornuskvæði (vidu aldonon 2-an) similas al tiu de Runtsivalsstríðið.

En la dua "ŝnurero" (parto) de Sigmunda balado malnova kantiĝas la tuta melodio dufoje en ĉiu strofo. La novvicoj okupas nur parton de la unua fojo (unuan kaj trian vicojn post la taktostreko), ĉio alia apartenas al la rekantaĵo:

(#4409. Sigmunds kvæði eldra:

,# Annar táttur: <:31> (mi /mimido dododo rere reee;re so sofa mi; mimi miimi miimimi re;mi faaami re do o; mi miido dodo re re;re so sofa miii;mi mimi mimimi mimimi rere;mi fami re do))

Kelkaj aliaj baladoj havas pli grandajn malsamojn inter la tonaroj. Ekzemple Signhild Fiera (NK 4439) havas du volvojn de tonaro septaktera (vidu aldonon 1-an, kolumnon 5) el kiuj nur 3 takteroj estas samaj plus unu taktero kiu enhavas parte samajn tonsilabojn (kolumnon 6). Sinsekvo da tonarvolvoj povas ankaŭ komenci en unu strofo kaj finiĝi en sekva strofo. En aldono 2-a la tonaroj estas tempomarkitaj. La longoj kaj nombroj da tonaroj retroveblas en aldono 1-a, kolumno 5. La sumo en kolumno 5 egalas al la nombro en kolumno 12. Ju pli bona estas la melodia akordiĝo inter la tonaraj volvoj, des pli alta estas la nombro en kolumno 6 (precipe la unua nombro, antaŭ la plusa signo +). Kie la nombro da volvoj estas pli ol du, tie staras pluraj sumoj en kolumno 5, vicigitaj tiel ke unue staras la rezulto por tiuj volvoj kiuj plej bone akordiĝas inter si.

Tiuj melodiaj ripetoj en si mem ne estas tre elstaraj komparub aliaj specoj de kantoj. Estas la longoj de la baladoj kaj la mallongoj de la strofoj kiuj donas al ili pezon kaj al la danco pelon.

La longo de la strofo kompariĝas kun la longo de la tonaroj en aldono 4-a, dekstra parto. La longo de tonaroj tre varias. Plej ofta nombro da takteroj en tonaro estas 14, sekvas 7, 16 kaj 8. Ni vidas ankaŭ ke ofte la nombro da takteroj en strofo estas malgranda nombro (1-3) plus oblo de la nombro da takteroj en la tonaro – komparu kun kolumno 5 en aldono 1-a. Oni povas tion tiel interpreti ke la melodio "ne volas ebeni kun la strofo".

Ĉi tiu maniero taksu per taktera kalkulo ne ĉiam donas "juston" al similaj inter tonaroj.

Ekzemple en Skrímslu kvæði la unua volvo de la tonaro havas dek ses takterojn, sed la dua verdire nur dek kvarajn. Pro "manko" de du takteroj post la oka, ĝiaj dekdua ĝis dekkvara takteroj (post tempomarko %k en aldono 2-a) venas tro frue por ricevi "kalkulpoentojn" de sameco. Mi tamen decidis resti ĉe tiu kalkulmaniero ĉar ĝi estas senambigua.

Do ni vidas tri aferojn kiuj igas la baladon ripeteca, facile sekvebla kaj sugestia:

- La rekantaĵo estas granda parto de ĉiu strofo.
- En kelkaj baladoj vortoj ripetiĝas en la rekantaĵo, partoj de strofoj aŭ tutaj strofoj.
- La melodio resonas samajn aŭ similajn tonarojn.

(Preterpase mi rimarkigas, ke ĉe multaj notitaj baladoj mankas melodio, ekzemple ĉe eystdans.dk, fotatradk.com, heima.olivant.fo, www.danshavn.org kaj www.heimskringla.no. Ĉi tio estas komprenebla pensub teĥnikaj malfaciloj redoni notbildojn, sed pro tonsilabado ne plu ekzistas tajpografiaj malhelpoj kontraŭ ĉiam publikigi la melodion kune kun la teksto. Krome, tonsilaboj estas pli facilaj por legikapablulo lerni kanti ol tradiciaj bildnotoj muzikaj).

4. Komparo kun ludpecoj

Ni povas kompari la malnovajn modelojn de dancobaladoj kun skandinava aŭ sveda popolmuziko. Tipa "spelmanslåt" (popolmuzikula ludpeco) havas du aŭ tri periodojn, senrigardub ĉu la peco iras en 2/4-, 3/4- aŭ 4/4-takto. La periodo komenciĝas dufoje en sama maniero sed kun diversaj finoj. Ĉiu periodo ludiĝas dufoje por volvo. Tio signifas ke kiam la peco ludiĝas unu volvon, tiam la komenco de la periodo ludiĝas kvarfoje. Se ĉiu "duonperiodo" (kun sama komenco) havas paran nombron da taktaj mezuroj, la tuta

peco havas nombron da taktaj mezuroj kiu divideblas per ok, ofte eĉ per 16 kaj 32. Ekzemplo je tio estas la sekva marŝo el Dalekarlajo. Sed antaŭ ĝi, iom pli pri tonsilabado:

- La rimarko <[do]=d> diras ke la melodio estas d-maĵora.
- La periodo ekiras de la kruco 2x dufoje. La fino de la unua fojo komenciĝas je '1 kaj tiu de la dua je '2.
- La kruco x2 diras ke la tuta peco () ludiĝas du fojojn.

Nun re al la marŝo:

Gånglåt (marŝo) el Mockfjärd laŭ Anders Frisell: <[do]=d, 1,3:2>

(# Unua periodo: 2x MiFa /SooLa SoFa /MiDo MiFa /SoLaSoMi Sodo /mi iiremi /faalafa miisomi /reefare doomido '1 /TiTi ReFaLaFa /So '2 /Tiso SoTireTi /do)x2

(# Dua periodo: 2x omi /fa famifaso /lafa doLa /Somi miremifa /so omi /mire rediremi /fare TiSo /doomido TiireTi '1 /LaadoLa So '2 /do)x2

En la tonsilabaĵo oni povas nombri ke ĉiu duonperiodo havas ok taktostrekojn (oblikvaj strekojn /). Tial la ludlongo de la unua periodo estas $8 \times 2 \times 2 = 32$ taktaj mezuroj kaj tiu de la dua periodo ankaŭ, kiam la tuta peco ludiĝas unu volvon. 32 taktaj mezuroj 2-takte fariĝas 64 takteroj.

Ni vidas do ke la "duonigo" de la peco estas minimume same treigita kiom tiu de la kantoj (vidu okan alineon de ĉapitro 2).

Tamen certaj malnovcaj pecoj povas havi malparan nombron da taktaj mezuroj en periodo. Jen ursaa polso kun naŭ taktaj mezuroj en la unua periodo:

Polso el Orsa laŭ Brend Jon Larsson: <[La]=a, :3>

(#1: 2x /Laado oTii SoooLa /nTi doITidore miiso /ITrifiimi Iredi '1 refi /laltilaso miire IdolTiLaSo '2 Ireeemi /lfiirefi mi i /9 i mi i)

(#2: (/nmiido omii Trsooomi /l:doTido. remi faaaal:sofamifa /mi. reeedo lreeefa /ltaaafa llaltilaso mi)x /i doooTi lSoTire /do La a)x

kie

- la ilumo [n] signifas arĉon malsupren, [l] ligate kaj [Tr] tremole. Ilumo validas ĉu nur la sekvan tonsilabon, ĉu ek de dupunkto : ĝis punkto.

Ĝuste la figuro de ripetata arĉtiro en fino de periodo, kiel en la naŭa takta mezuro (#: /9 i mi i) supre, estas kutima en malnova ursaa muziko sed emas forfali en modernaj ludadoj. Tian taktomezuron en malnova tempo oni povis ripeti kaj du- kaj trifoje sinsekve, kio revenigas mian penson al la aldonata vorto "Ingur" en la fino de la rekantaĵo de Drako Longa (vidu la okan alineon de ĉapitro 2).

Estas konate ke pecoludado fariĝis pli "ebena" dum la dudeka jarcento. En malnova tempo malkutimis okazi ke du muzikuloj ludas kune. Ili ofte ne povis akordiĝi pri tio, kiel la peco ludiĝu, kun aŭ sen certaj aldonataj taktomezuroj, kiel agordi la instrumentojn aŭ eĉ kie situu la sepa tono de la tonskalo: ĉu la dekkvina naturtono [Ti], la sepa naturtono [Tu] aŭ la intera malaltigata septavo [Ta] (vidu la trian punkton de aldono 3-a). Kunludado povis en plej malbona kazo misiĝi en batalon, sekvab disrompitaj violonoj. Nuntempe la ludado estas pli egalforma, kun paraj nombroj da taktomezuroj kaj ĉiam pli egaltempera tonskalo. Mi supozas ke tio estas rezulto de influo de klasika muziko komponita.

5. Tonamplekso

Fine mi sentis ke mi devus ankaŭ esplori kiel diferencas tonampleksoj. Oni foje povas ricevi impreson ke pli malnova balado ne uzas tiom grandan parton de oktavo – aŭ ebla tonaro – kiom pli nova muzikpeco. Sed ĉu vere estas tiel? Kaj kiel oni mezuru tion?

Por ĉiu melodio mi dividis la tonalton de ĝia plej alta tono kun la tonalta de la plej basa. Se la melodio ekzemple moviĝas – kiel faras Breŝta balado – inter tonoj [Mi] (plej basa) kaj [re] (plej malbasa), mi dividas na [re] per [Mi] (vidu trian punkton en aldono 3-a) kaj rezultiĝas tonamplekso

$$[re]/[Mi] = (2 \times 9/8) / (5/4) = 9/5 = 1,8$$

kio estas iom pli malgranda ol oktavo (2). La cifero 1,8 retroveblas en aldono 1-a, kolumno 3.

Rezulte, 51 melodioj de la baladoj en la feroa havas mezuman tonamplekson je 1,86 dum 18 melodioj de danaj tekstoj (el kiuj ĉiuj krom unu kantiĝas en Ferooj) havas na 1,77 kaj la 22 svedaj melodioj havas na 2,03. Tamen dubindas ĉu la diferenco estas statistike signifika. La plej malgrandan tonamplekson, duonoktavon (1,44) havas NK4460 Sinklarkanto. Ses baladoj, el kiuj kvar feroaj kaj du en la dana kiuj danciĝas en Ferooj, ampleksas nur unu kvintavon (1,5). La tri plej grandaj tonampleksoj apartenas al Nornageŝt ríma (2,67), Torsteins kvæði (2,5), ambaŭ melodioj laŭ muzika grupo Týr, kaj varianto de Sigurda balado (2,5).

El la feroaj kaj danaj "primaj baladoj", 16 melodioj kun 29 takteroj por strofo havas tonamplekson mezume 1,84 kaj la mezumo de 8 melodioj 31-takteraj estas 1,78. Eĉ se la varianco aspektas aspektas pli malgranda por la 29-takteraj baladoj, la nombro da melodioj verŝajne estas tro malgranda por fari cetrtajn konkludojn. Mi tamen kalkulis nek la statistikajn deviojn nek la konfidencajn intervalojn.

6. Baladoj fortigas lingvon

Iam antaŭlonge mi aŭdis diron ke la feroa lingvo travivis ĝis nuntempo multe dankub la baladoj kaj la danco. Tio aspektas al mi verŝajna. En la komenco de mia vivtempo la pozicio de la feroa en socio estis, laŭ mia

komprene, ĉirkaŭ same forta kiom tiu de la dalekarla. La dalekarla estas nordaja lingvo parolata en Ovansiljan (Supersilga regiono), tio estas supra parto de Orienta Dalekarlajo, almontob lago Silgo (Siljan). La dalekarla forte diferencas de la regne sveda. La lingvo havas tri ĉefdialektojn: Muraa (Mora), ursaa (Orsa) kaj elfdala (Älvdalen). La diferencoj inter tiuj tri estas proksimume same grandaj kiom la diferenco inter sveda kaj (orient)norvega. Tradicie la homoj parolis dalekarle enib Supersilgo kaj ŝanĝis al sveda kiam ili vojaĝis ekster tiu regiono – al Rättvik, Falun aŭ pli fore – por komprenatigi sin.

Delonge la ĉendancoj en Dalekarlajo estas senvortaj melodioj tritaktaj, kiujn ludas muzikulo dum la homoj dancas silentantaj. Estas al mi nekonate kial la kanto malaperis el la danco, ĉu pro laŭto de muzikiloj, fanatika religia subpremo aŭ io alia. La dalekarlaj dialektoj hodiaŭ estas perdantaj siajn lastajn parolantojn, dum la feroa ricevis oficialan statuson als unua lingvo en sia teritorio. Tio estas malĝoje por Dalekarlajo. En la traduka laboro mi trovis multajn similaĵojn inter la feroa kaj la ursaa, kaj gramatike kaj vortoprovize, similaĵojn kiuj preterpasas la hodiaŭajn regnajn lingvojn svedan kaj norvegan.

Esperanto havas pli da parolantoj ol ekzemple la islanda. Sed la lingvo estas maldensa, ĉar la parolantoj disas en pli ol cent landoj. Multaj parolantoj tial ricevas maltro da ekzerco uzi la lingvon en sia ĉiutago. Aldone, por tre malmultaj homoj la espa estas la unua aŭ gepatra lingvo. Oni tial povas aserti ke esperanto havas saman bezonon kian la feroa je "baladdanca kulturo" kiu fortigas la lingvon ĉe ties parolantoj.

Tial mi volas nun kaj ĉi tie peti de la feroa popolo permeson kaj bonvolon lasi aliajn popolojn provi ĉi dancoformon kaj kanti la malnovajn feroajn baladojn en esperanto – lingvo kiu apartenas al ĉiu kiu

lernas ĝin kaj kiun ĉiuj homoj kapablas lerni multe pli facile kaj rapide ol iun alian kulturlingvon. Bresta balado estas la traduko kiun mi mem lernis, mi opinias ke ĝi estas mirinda rakonto kun bona melodio kaj rava rekantaĵo.

7. Paralelaj tradukoj

Por vidi kiel diversaj traduklingvoj diferencas inter si, mi provis traduki Brestan baladon en ankoraŭ du lingvojn pli. Aldono 5-a do enhavas miajn tradukojn en

- la svedan, mia propra gepatra lingvo,
- la ursaan, nordaja lingvo kiun mi lernis de mia avo sed ne tute regas,
- esperanton, mia hejma lingvo dum pli ol 20 jaroj kaj la plej sekvema kaj kreativa lingvo kiun mi konas.

La ekzemplo estas anekdota kaj sen statistika signifikanco. La du nordajaj tradukoj krome estas faritaj rapide komparub la espa. La ursaan tradukon kontrolis kaj refaris s-no Karin Ohlsén, Orsa, unu el malmultaj homoj kiuj ankoraŭ parolas la ursaan ĉiutage. Ne pretas ĝiaj rimoj kaj ritma poluro. Tamen permesu al mi fari kelkajn observojn sen konkludi pro tio ion ĝeneralan:

La similecoj gramatikaj inter la feroa kaj la ursaa apenaŭ montriĝas en la traduko. Tio dependas ĉefe je tio, kiajn gramatikajn formojn uzas la balado.

La sveda traduko povis uzi la vortelekton de la feroa pli multe ol povis la ursaa. Tio unue surprizis min. Penseblas ke la kialo estas ke la ursaa estas juna skriba lingvo, kvankam malnova parole. La skriba juneco igas ke malnovaj skribaĵoj kun konservataj malnovaj vortelektoj mankas. En la sveda tiuj pli aĝaj vortoj ankoraŭ troviĝas en la literaturo, eĉ se ili malofte utiliĝas en la ĉiutago, kaj tial komprenatas de plej multaj legantoj aŭ aŭskultantoj. Krome, la ursaa ĝis nuntempo estas precipe kampula lingvo, kio faras ke certaj vortoj kaj esprimoj sentiĝas pli fremde ol en la sveda.

Multaj maraj esprimoj mankas en la ursaa ĉar ĝi estas enlanda (senmarborda) lingvo.

La traduko ursaa estas fonetika. Al la ursaa ankoraŭ mankas norma ortografio, ĉar tiuj lingvistoj kiuj interesiĝis pri ĝi ne havis ambicion konservi aŭ fortigi ĝin sed nur studi ĝin akademie.

Esperanto estis la ege plej facila lingvo en kiun traduki. Tio proas la tre flekseblan karakteron de esperanto kun kreativa vortformado kaj libera vortordo. Eble la nejungo al nordĝermana vortostoko ankaŭ faras ke la tradukanton malpli tentas "minimumigi la diferencojn" inter la traduko kaj la originalo (kio neniel malhelpas ke la traduko fidelu al la rakonto, ritmo kaj rima strukturo de la originalo).

La ekzemplon oni povas resumi tiel, ke ju pli similis la lingvoj, des pli malfacila montriĝis la tasko traduki inter ili.

8. Novaj baladoj

En la traduklaboro naskiĝis la penso krei novajn baladojn, heroajn rakontojn el la historio de la esperantomovado.

Balado povas plenumi plurajn funkciojn samtempe: Ĝi povas kontribui al la sociala kunesto dum kaj lokaj kaj internaciaj kunvenoj, kongresoj kaj junularaj tendaroj en esperanto. Ĝi povas esti bona ekzerco de la lingvo por komencantoj aŭ tiuj, kiuj malofte havas okazon paroli la lingvon en sia proksima ĉirkaŭaĵo. Pro ĉi tiu kialo estas avantaĝo se proverboj kaj kutimaj parolturnoj povas esti enplektitaj en la balado. Trie, verece kaj sciplene verkita nova balado povas esti bona historia instruo al parolantoj, kiuj ofte havas maltaŭgajn sciojn pri la historio de esperanto kaj naivan sintenon al la opozicio kiun renkontas la lingvo, precipe el "eksaj" koloniaj potencoj.

Sed se oni volas krei novan baladon en alia lingvo, kiel oni povas tiam dedukti ĝian stilon al feroa aŭ nordaja tradicio? Mia elekto tielis:

- La rapido devas esti bona por balada danco, ĉirkaŭ <1,4-1,8:> takterojn (batojn) por sekundo.
- La rekantaĵo estu la pli granda parto de ĉiu strofo.
- Tiu parto de la strofo kiu ne estas rekantaĵo sekvu la modelon de (4; 3; 4; 3;) takteroj por vico, kie la vortoj en ĉiu sepa taktero rimas.
- La nombro da takteroj en ĉiu strofo estu prefere 29, duaelekte 31, triaelekte alia primo.
- La lasta silabo en la rekantaĵo daŭru unu aŭ du tutaj takterojn, tiel ke la ligo al la sekva strofo estu ritme simpla por kanti.
- La melodio ne ampleksu pli ol unu oktavon.
- La melodio enhavu du aŭ tri volvojn de simila tonaro.
- Prefere kelkaj vortoj en la rekantaĵo ripetiĝu.
- La balado rakontu pri persono en certa okazaro. La persono estu aŭ karaktera aŭ grava por la historio de esperanto.
- La rakonto dramiĝu helpab dialogoj.
- Kiom eble plej malmultaj homoj nomiĝu per nomo.

Ekzistas multaj kandidatoj por herooj en tiaj novaj baladoj. Inter ili menciendas

- la kreinto mem de la lingvo (1859-1917),
- lia plej juna filino Lidja Zamenhof (1904–1942), kiu post "tutviva" laboro por esperanto kaj Bahao pereis en nazia koncentrejo Treblinka,
- la pioniro Valdemar Langlet (1872-1960), kiu en Upsalo kunfondis la unuan aŭ duan esperantoklubon en la mondo, eldonis la tiam ununuran gazeton Lingvo Internacia, fariĝis la unua persono kiu vojaĝis eksterlande per esperanto, vizitis Levn Tolstojn

en Rusujo kaj kvindek jarojn poste savis dekmilojn da judoj en Budapeŝto de la neniigo,

- lia dua edzino Nina Borovko-Langlet (1896-1988),
- la gazetisto William Thomas Stead (1849-1912), kiu fondis Britan Esperanto-Asocion, kunlaboris kaj poste rompis kun Cecil Rhodes, kontraŭlaboris kaj prokrastigis la atakplanojn de angla imperio en Bura Milito kaj poste kontraŭ Germanujo, kontraŭis kreon de Federal Reserve en Usono sed dronis kun la ŝipo Titanic, kaj
- la nobelo Ivo Lapenna (1909-1987), ebla potencorivalo al Brosip Tito en Jugoslavujo, poste estro de la esperantomovado kiu proksimis al atingo igi Unuiĝintajn Naciojn adopti esperanton sed en 1974 detroniĝis en puĉo.
- Antonina Borovko (1872-1948), naskita Szalko-Czajkowska, esperantistino ek de 1887 kaj dua bopatrino de Valdemar Langlet.

La unua el tiuj novaj heoj baladoj nomiĝas Valdemara balado. Vidu aldonon 6-an. Kaj Valdemara kaj Bresta baladoj prezentiĝos baladdance en internacia kunveno de esperanto en somero de 2015. Ni esperas ke balada danco tielmaniere fariĝos reokazanta instruativa parto por fortigi socialan kuneston en interpopolaj kunvenoj. Nova balado aldone ja havos gravan aktualan historion por rakonti.

Malgrandan nombron da feroaj baladoj mi tradukis en tiun lingvon kiu apartenas al la tuta mondo, por doni al ĉiuj homoj eblon partopreni baladdancon ĝisplene. Estus revdeziro pravigata se eĉ venus iu tago kiam feroanoj, krom la kantojn kiujn oni jam kantas feroe kaj dane, ekprenus iun baladon espe kaj per tio jesu ke la feroa baladdanco estas kultura trezoro por la tuta homaro.

9. Kelkajn vortojn pri verkado

Kun la elirpunktoj dirataj en ĉapitro 8 mi komencis per fari melodion. La melodio de Valdemara balado finfine estas refando de la Bresta, kio rimarkeblas per ĝia humoro aŭ "tona pejzaĝo" kiu ekas alte kun malsuprendeklivo de [la], la dua duono de la novvicoj iomete pli malalte kaj la rekantaĵo en pli profundaj tonoj kiuj supren grimpas en malmultaj takteroj proksimaŭ la fino, dum la tono [la] havas ĉefrolon. Vidu laste en aldono 2-a aŭ mallaste en aldono 6-a.

Viljaman baladon antaŭis ke mi "merĝiĝis" en plurajn el tiuj melodioj kiuj staras en aldonoj 1-a kaj 2-a kaj kies tekstaj vicoj sekvas la taktomodelon (4; 3; 4; 3;), interalie #Gudbrandskvæði, #Kópakvæðið kaj #Skrímslu kvæði". La melodio sentiĝas iom pli trankvila ol la Valdemara kaj ripozas multe je la tono [mi] kaj la agordo [domiso] kun [refala] kiel apoganta flankagordo:

(# Ŭiljama balado: <:29> /mimi dore mifa soso; soso milsomii dodo; lala fami redo remi; fafa remi fafa; mi dore mifa soso mi; somi do fala fami; redo remi fare mi do o)+ (&: '1 /Pri heroa granda viro ; ĉi bala2do temas ; dum mi kantas verajn dirojn ; mia koro tremas. (x: Malvarmas Atlantika Mar' ; sed militon venigas ; imperion rega rabem'.))

(Vortsilaba peco kiu komenciĝas per kruco kaj dupunkto (x:) enhavas rekantaĵon).

La rekantaĵo aludas al la perejo de ŝipo Titanic kaj konvenas al la ondanta "hulo" de la melodio.

Poste mi tonigis Ivan baladon en sama spirito sed ne kontentis pri la rezulto, ĝi fariĝis iom teda. Kun kaj ĝi kaj Lidja balado mi do ekuzis tute alian aliron. Ambaŭkaze mi eliris el polso. Devis trovi melodion kiu tenas sin enib aŭ preskaŭ enib unu oktavo.

Por Iva balado mi prenis na (# Polso el Orsa: (#A: iMi x /1Lado mifa mire /2redo dooTi domi /3so sofaso laso /4so '1 mire doTi '2 mi i /9i mi)x (#B: (imi /1laaso mi imi /2reTi do)x Ti /5LaTi domi doLa /6TiSi La a)x).

La unuaj kvar taktaj mezuroj (numeritaj) en la #A-periodo sufiĉas por la rakonta teksto de la balado (ĝis %O) se oni longigas la unuan takteron en taktomezuroj %1 kaj %3: (# Iva balado. Minora: /LaLa dodo mifa mire; redo doTi domi; soso soso faso laso; soso mire doTi; %O Lado mifa mire redo doTi; domi laso mimi LaTi %tdodo; mimi%u doLa TiSi La a).

La rekantaĵo (post %O) komenciĝas per la sama tonaro, kvankam ne longigita, kaj poste ŝanĝiĝas al iomete mallongigita versio de la #B-periodo. Ĝia divido en tekstovicoj (;) tute dependas je tio, kiujn vortojn oni elektas por la rekantaĵo. Ĉar la balado reale iras en unutakto, la poeto havas grandan liberon elekti.

Por rekantaĵo unue mi elektis du vicojn el la himno de esperanto, La Espero, kun mallongiga vortoŝanĝo en la fino por ke ĝi longu 15 takterojn (&Rekantaĵo:; Ne al glavo sangon soifanta ; al la mond' eterne militanta ; ĝi promesas pa2con.). Tiam fariĝis melodia akcento sur la vorto "eterne", kion mi ne volis ĉar tio sonas tro pesimisme. Por meti la melodian pinton [laso] sur "mond'" anstataŭ ĝi, mi fendis la kvine lastan takteron en du (inter %t kaj %u ĉi supre), per kio la taktero [laso] povis plifruigi je unu bato. Alia eblo pri kiu mi umadis estis anstataŭe prokrasti ĝin unu baton tiel ke ĝi restu sur "militanta": (#: ... ; domi mimi domi laso mimi; LaTi doLa TiSi La a). Tion ke la lasta silabo ricevu du takterojn mi ne volis forlasi.

Tamen sentis mi kaj fine konvinkiĝis ke ne estas taŭge "ŝteli" vortojn el alia konata kanto por la rekantaĵo. Do mi sukcesis verki novan, kiu portas mesaĝon gravan en ĉi epoko de lingvaj formortoj en la postakvo de koloniaj imperioj kaj tutmondigo: (&Rekantaĵo:; Ĉiu regu sin popolo kaj laŭ sia volo kaj en lingvo heredita de prapa2troj.)

La melodio de Lidja balado estas ĉerpita de alia dalekarla polso, (# Polso el Orsa, el periodaĵo Runa en jaro 1844. La sonorilbovinoj de Satano: <[la]=d> (#A: /MiSi LaTi dooTiLa /SiTi re reeTi /mido La LaFi /LaSi Mi i)x (#B: /1TiSi Ti Tidore /2mifa mi re /3doTi LaSi LaTi /4dore do TiSi /5MiSi La a)x). Ĉi foje mi provis enigi "la tutan" polson en la baladon.

Kostub simpligo de la melodio la unua periodo (#A) fariĝas tonaro dekunutaktera (4; 3; 4;) – kvankam mi kunmetis unuan kaj duan takteron en unun kaj fendis la trian en du, ĉar sentiĝis pli bone tiel kanti: (#: MiLa dodo LaLa SoTi; rere rere mido; LaLa LaLa LaSo Mi;). Se la tria vico (kun kvar takteroj) estos rekantaĵo, la tonaro konvenas al novvicoj laŭ la modelo (4; 3; 4; 3;) kiam oni lasas al ĝi du volvojn. Tiam restas naŭ takteroj ĝis :31 kaj ni ricevas rekantaĵon kun resono kiu komenciĝas per fini la unuan volvon de la tonaro, en la sama maniero kiel "Mi paŝas gaje" en la dua parto de Sigmunda balado malnova: (4; 3; 4; 4; 3; 4; 9;). Tamen la tonaro de Lidja estas pli mallonga kaj mi prenis du vicojn kiuj rimas anstataŭ ripeti la saman tekston denove: (&:Pri heroa brava homo ; temas mia kanto (x:: Fajro flamas en la forn' ;) Lidja Zamenhofa nomo ; gloras esperanton (x:: Pikas preme drata dorn'. ; Ke la tagoj de l' homaro estu pli lu2maj.)

Por igi la duan periodon (#B) nur naŭtaktera mi mallongigis la melodion kaj anstataŭigis la sep takterojn #B%2.3-%4 per nur unu, [doLa]: (#: TiSi TiTi rere mifa mi doLa MiSo La a). Tiam la polso ankoraŭ rekoneblas.

La melodio ne evidente "rompas" ĉe la finoj de la tekstaj vicoj (;). Tio sentiĝis iom ĝene en la komenco, sed mi pensis ke ĝi povas doni al la balado pli fortan "pelon", kiam la rekantaĵo "trudas sin" sen intera ripozo en la tonaro. La rimo de la rekantaĵo aludas al koncentrejo Treblinka kun pikdratoj kaj fornoj kie bruliĝas homoj sen povi haltigi la detruadon.

En la unua versio de Lidja balado la rekantaĵo finiĝis per modifita elĉerpo el la

himno de esperanto (&: Tra la mondo iras forta voko de la esper'), sed fine mi alvenis al konkludo ke malkonvenas preni vortojn de unu kanto al alia kun alia melodio. Anstataŭe mi prunteprenis titolon de kolekta verko pri ŝi.

Pro sama kialo mi poste ŝanĝis la rekantaĵon de Iva balado al (&Rekantaĵo:; Ĉiu regu sin popolo kaj laŭ sia volo kaj en lingvo heredita de l' prapa2troj), tio estas laŭdo al demokratio bazita je la popolaj lingvoj. Post iam eble mi mi trovos vortojn kiuj eĉ pli bone priskribas la vivatingon de Ivo Lapenna. Ni povas kompari kun Sigurda balado, kiu tra plurcent strofoj kun variaj aventuroj ripetas la grandiozaĵon ke estis Griza kiu portis la oron de la sablejo post tio ke Sigurd mortigis la drakon. Estis Ivo kiu levis kaj antaŭen portis esperanton kaj Universalan Esperanto-Asocion al Unuiĝintaj Nacioj kaj UNESKO.

Unu el la plej malfacilaj aferoj sukcesi kiam oni verkas novajn baladojn pri historiaj personoj estas la dialogoj. Ili preskaŭ neniam aperas en la fontaj skriboj. Oni devas mem krei la vortinterŝanĝojn kiuj devus povi esti okazintaj kaj kiuj antaŭen portas la rakonton.

Post zorga esploro de la tonampleksoj de malnovaj baladoj (vidu aldonon 1-an, kolumnon 3) mi komprenis ke granda tonamplekso povas malgrandigi la sugestian forton de balado. Tial mi refaris la finon de la melodio de Valdemara balado tiel ke ĝia tonamplekso fariĝis 1,anstataŭ 2. Ĉi tiun varianton, kies rekantaĵa parto mi nun uzas, mi nomas als #3. La malnova melodio (#1) rekantaĵa povas funkcii kiel dua voĉo.

10. Referencoj

Dalekarla:
eo.wikipedia.org/wiki/Dalarna#Lingvoj

Esperanto: esperanto.org

.
Novaj internaciaj baladoj: nk.tone.se,
www.ipernity.com/blog/62038/787463,
eo.wikipedia.org/wiki/Valdemar_Langlet,
eo.wikipedia.org/wiki/Lidja_Zamenhof,
eo.wikipedia.org/wiki/William_Thomas_Steard,
eo.wikipedia.org/wiki/Nina_Borovko-Langlet,
eo.wikipedia.org/wiki/Ivo_Lapenna,
eo.wikipedia.org/wiki/L._L._Zamenhof

Tonsilabado: tone.se,
eo.wikipedia.org/wiki/Tonsilabo,
[hu.wikipedia.org/wiki/ – Kodály-módszer](http://hu.wikipedia.org/wiki/Kodály-módszer),
www.iks.hu/

Tradukitaj baladoj:

nk.tone.se – '#44. Baladoj
www.ipernity.com/blog/62038/781375

Ĉi artikolo espe:

<http://nk.tone.se/Ballads2015eo.pdf>

kaj svede:

<http://nk.tone.se/Ballads2015sv.pdf>

Aldono 1-a. Kompara tabelo

Komparo inter nordajaj baladoj (kaj pli modernaj "baladeskoj") tradukitaj al esperanto, aliaj feroaj dancobaladoj trovitaj interrete kaj nove verkitaj baladoj en la internacia lingvo. La tabelo provas doni

superrigardon pri la melodia, kanta kaj ritma strukturoj de la baladoj. Ĉiuj melodioj tonsilabiĝas en aldono 2-a. La tradukitaj baladoj en Norda Kantaro ĉerpeblas je <http://nk.tone.se>, ĉapitro "44. Baladoj".

NK-n-ro	Balado	Ton-am-plek-so	Ton-den-so	Takteroj en tonaro		Ling-vo	N. da strofoj ^{6 7}		N. da takteroj en ripetox ,rekantaĵo :tuta strofo
				nombro xvolvoj +ceteraj	samaj +parte samaj		origi-nale	espe	
<i>kol. 1</i>	<i>kol. 2</i>	<i>kol. 3</i>	<i>kol. 4</i>	<i>kol. 5</i>	<i>kol. 6</i>	<i>kol. 7</i>	<i>kol. 8</i>	<i>kol. 9</i>	<i>kol. 10, 11, 12</i>
4401	Sigurdskvædet. Regin smed, varianto A	2,50	1,00	16x2 +5	9+1, 8+2	fo	'163	'163+2	6x ,23 :37
"	", Streymoy	2,25	0,86	"	"	"	"	"	"
"	", Suðuroy	2,13	1,08	"	"	"	"	"	"
4402	Sigurdskvædet. Brynhilds tåt	" " "	" " "	"	"	"	'232	3	"
4405	Vilmundskvædet	1,50	1,12	14x2 +6	7+6	fo	'80	'80+1	4x ,20 :34
4406	Virgarskvædet	1,80	1,17	7x2 +15	4+3	fo	'115	4	0x ,15 :29
4407	Jallgrimskvædet, Suderö	2,13	1,31	8x2 +13	3+1	fo	'83	26	0x ,15 :29
"	" , Torshamn	1,67	1,00	7x2 +15	2+2	"	"	"	"
4408	Brestiskvædet	1,80	0,97	7x2 +15	1+3	fo	'60	'60	0x ,15 :29
4409	Äldre Sigmundskvædet, tåt 1	1,78	0,87	5x2 +21	5	fo	'25	'25	6x ,20 :31
4409	Äldre Sigmundskvædet, tåt 2	1,50	0,77	15x2 +1	15	"	'21	'21	6x ,23 :31
4409	Äldre Sigmundskvædet, tåt 3	2,00	1,33	16x2 +1	14	"	'39	'39	6x ,23 :33
4411	Yngre Sigmundskvædet, tåt 1	2,00	0,90	5x2 +21	3+1	fo	'33	14	6x ,20 :31
4411	Yngre Sigmundskvædet, tåt 2	2,00	1,07	20x2 +1	16+3	"	'31	14	7x ,28 :41

⁶ Nombro da strofoj en esperanto komencib jaro 2015.

⁷ Manko de apostrofo ' antaŭ la nombro en kolumno 9 aŭ 8 montras ke la espa teksto ankoraŭ ne pretas.

4412	Den bergtagna	2,40	1,11	28x1		sv	'21	'21	0x ,12 :28
4413	Grettiskvädet	1,60	1,15	14x2 +5	13+1	fo	'112	1	4x ,19 :33
4414	Ormen långe, Hafn	2,00	0,90	7x4+1	2+2, 2, 1+3, 1+2, 1+1, 0+3, 0+2	fo	'86	'86+1	0x ,15 :29
4414	Ormen långe, varianto B	1,78	1,14	"	2+1, 1+3, 1, 0+4, 0+2, 0+1	"	"	"	"
4414	Ormen långe, Suðuroy	2,00	1,14	7x2 +15	5+2	"	"	"	"
4415	Ramund hin Unge	2,00	0,92	16x2 +18	16	da	'23	3	0x ,7 :50
4417	Ólavur Riddararós	1,67	1,43	28x1		fo	'39	4	6x ,20 :28
4418	Liten Karin	1,80	1,22	8x2 + 8x2	8, 8	sv	'13	'12, '13	16x ,0 :32
4418	Bøhmerlandsdronningen	2,00	0,70	14x2 +12	8	da	'23	3	0x ,12 :40
4430	Jag skall giva dig en oxen stor	2,40	1,63	35x1		sv	'5	'5	0x ,17 :35
4436	Jon och Lager (i 3/4-takt)	2,40	0,61	18x2 +21	14+1	sv	'29	5, '29	6x ,21 :57
4439	Stolt Signhild	1,50	0,65	7x2 +17	3+1	da	'19	'19	0x ,15 :31
4440	Vänner och fränder	2,40	1,03	31x1		sv	'15	'15	11x ,5 :31
4442	En ung sjöman förlustar sig	2,25	1,56	8x3 +1	5+3, 3+5, 1+12	sv	'7	'7	4x ,6 :25
4448	Bonden och kråkan (i 4-takt)	2,13	0,91	32x1		sv	'17	'17	8x ,16 :32
4448	Bonden och kråkan (i 3-takt)	2,00	1,56	18x1		"	"	"	4x ,6 :18
4450	Liten Kersti stalledräng	2,13	1,48	9x2 +9	4+1	sv	'25	'25	0x ,12 :27
4454	De två systrarna. 1	2,22	1,12	6x2 +20	3+1	sv	'15	'15	8x ,16 :32
4455	De två systrarna. 2	1,67	0,53	16x2 +4	2	sv	'12	1	0x ,20 :36
4460	Zinklarvisa	1,44	0,88	14x2 +13	13	da	'19	'19	0x ,13 :41
4466	Albertina	2,00	1,06	16x2	1+5	sv	'13	'7, '12	8x ,8 :32
4470	Möte i monsunen	2,22	0,78	16x2	2+2	sv	'17	'17	0x ,0 :32
4472	Bättre tiga än illa tala	2,00	0,88	8x5	4+1 3+2 3+1 2+3 2+2 1+2 1+1 0+3 0+1 0	sv	'19	'19	0x ,24 :40
4476	Koloregrisen	2,00	0,93	12x3 +4	12, 5	sv	'17	'17	12x ,16 :40
4478	Sven i Rosengård, #1	1,61	0,60	16x2 +8	9	sv	'12	3, '12	0x ,24 :40
4478	Sven i Rosengård, #2	1,60	0,92	24x1		"	"	"	0x ,16 :24
4480	Balladen om briggen Blue Bird av Hull	1,78	1,02	8x4 +34	8, 3+2, 2+3	sv	'6	'6	0x ,0 :66

4484	Ebbe Skammellsson	2,00	1,65	8x2 +7	7+1	sv	'47	'47+1	0x ,7 :23
4490	Tolfmilan skog	1,78	0,88	8x2 +24	8	sv	'13	'13	7x3 ,8 :40
4495	Flickan i Havanna	1,78	1,38	8x3 +8	5+2, 4+3	sv	'5	'5	0x ,6 :32
4497	Balladen om den kaxiga myran	2,22	0,95	16x2 +8	5	sv	'7	'7	5x ,0 :40
	Blakman konge	1,67	0,68	14x3 -1	12+1, 7+2, 6+2	da	'30		0x ,14 :41
	Brókar táttur	1,67	0,90	14x2 +1	9+1	fo	'49		0x ,15 :29
	Brúðarvísa av Eyðun Eliassen	2,00	0,83	29x1		fo	'24		0x ,14 :29
	Brúðarvísan	2,00	0,67	23x2 +35	19+1	fo	'22		0x ,0 :81
	Brúsajøkils kvæði	1,69	0,97	7x4 +2	5, 1+5, 1+1, 0+5, 0+4	fo	'86		0x ,16 :30
'42 Kappa manst tú kalla teg, ; dólgur ert tú av sonnum, ; kanst tú ekki við tógva tylvtum ; vinna á tveimum monnum!	'42 Kämpe männe du kalla dig ; dolsker är du så sant ; kan du icke med två tolfter ; vinna över tvenne mannar!	'42 Kempä bell du kölla di ; _ _ ir du sö så2nt ; kånint du mi twe2r tölftum ; winna a twe2r kalla!	'42 Vi heroo nomu vin ; stulta vi estas prave ; vi ne povas per du dekduoj ; sur du viroj venkon havi!
'43 Heysta manst tú harm og háð, ; tað spyrst um leið so langa, ; liðið leyp á tógva menn ; og mátti aftur ganga.	'43 Hösta må du harm och hat ; det spörjs om lejd så långa ; följet löpte mot tvenne män ; och måtte igen gånga.	'43 Esta mo du arm ö at ; sö ledigåd ö löngu ; kniktär kajtöda a twer kallum ; ö foå atta etter gönga!	'43 Vi rikoltu triston, mokon ; kaj longe çin ricevos ; trupo kuris al du viroj ; kaj fantomi devos.
'44 Vilt tú millum manna metast, ; og bilar tær ei hugur, ; fyrstur gakk á klettin upp ; og vís so, hvat tú dugir!"	'44 Vill du ibland mannar mätas ; och felas dig ej hugen ; gå först själv på klinten upp ; och visa vad du duger!"	'44 Wil du milla manna mätas ; ö fätäsint diga ugön ; gök sjöv fösst a klittem upp ; ö wajs sö wenn du dugör!"	'44 Se vi inter viroj validu ; kaj ne mankas em' ; iru rokon vi unue ; kaj montru taugon mem!"
'45 Argur gjørdist Havgrimur, ; ilskan vóks um mótið, ; rendi hann móti Bresti upp ; og legði til við spjóti.	'45 Arg vart väl Ha2vgrim ; ilskan vax om modet ; rände han mot Breste upp ; och lade till med spjutet.	'45 Argör wart do A2vgri2m ; ilska waks um mode ; kajtöd ånn mot Breste upp ; ö la2d til wi spjote.	'45 Koleriçis Havgrimo ; preter la maltimon ; kuris kontraü Bresto supren ; kun lanco en proksimo.
'46 Spjótið gleið í	'46 Spjutet gled i	'46 Spjote gled i mio	'46 Lanco glitis en

miðju inn ; stál í indrum lendi; Brestir gjörði eitt avreksbragd ; hann banasár sær kendi.	midjan in ; stál i inre länden ; Breste gjorde hjältebragd ; han banesår sig kände.	in ; stál i indra lendi ; Breste djard jenn ; ån banasår si kendä.	talion ; ştalo femurprofundon ; Bresto faris finan trukon ; sentis mortigvundon.
'47 Trysti hann seg á stungu fram ; blóð úr beni oysti ; høgdi so til Havgrim sterka ; øksl og arm hann loysti.	'47 Tryckte han sig mot stinget fram ; blod ur benet öste ; hogg så till mot Havgrim starke ; axel och arm han löste.	'47 Trikket ån si mot stöndje fråm ; blödn ir bene este ; agg sø åv mot Avgrim starka ; årda ö armån leste.	'47 Premis li sin sur pikon plu ; gambo sangon lançis ; hakis forte Havgrimon ; şultron, brakon detrançis.
'48 Deyður dettur Havgrímur ; og Brestir omaná. ; Beinir berjist menniliga ; tó hann falla má.	'48 Döder faller Havgrim ; och Breste ovanpå ; Bene värjer sig manligen ; dock han falla må.	'48 Dedör weltör A2vgrim ; ö Breste etter o ; Bene bärgöd si mannluga ; men twunndjig tä stajpa endo.	'48 Morta falas Havgrimo ; kaj Bresto super lin ; Bejno luktis vire lerte ; tamen falis fine.
'49 Tóri runnu tår á kinn ; harðnar Sigmunds sinni ; "Grátum ekki frændi mín ; vær goymum væl í minni!"	'49 Tor så rann tår på kind ; hårdnar Sigmunds sinne ; "Gråt nu icke, frände min ; vi gömme väl i minne!"	'49 A Tore rann jen tår o tcindem ; årdnör Sigmundar sinnä ; "Wålum int, frendä men ; wi gämum wel i minnä!"	'49 Toron fluis larmo vange ; duriçis Sigmund kore ; "Ni ne ploru, ho fratul" ; sed kaşu bonmemore!"
'50 Tróndur trínur á válin fram ; væl kundi hann orðum greiða ; "Ikki vinst á hvørjum vetri ; i Valhøll betri veiða.	'50 Trond han träder på vallen fram ; väl kunde han orden taga ; "Ej man vinner i varje vinter ; i Valhall är bättre att jaga."	Trond ån träder o swärde fråm ; wel kund ån wördå lågå. ; "Int ån winnör wenn wittör ; i Walall bettör jägå.	'50 Tretas Trond sur batalejo ; bone li vortojn lasis ; "Gajnas ne en çiu vintro ; en Valhal <17> pli bonas çasi.
'51 Hoyrast mugu hetjur hesar ; hart um Bifröst fara; doyggja má hvør menskur maður ; tó ei mansins æra.	Höras må väl dessa hjältar ; hårt om Bifrost fara ; dö var tapper mänska måste ; men ej mänskans ära.	'51 Årast moå issör jältör ; årt um Bifrost fårå ; dajja mo wenn tappör mennstca ; men int onums ära.	'51 Sperti devas çi herooj ; dure Bifrosten<18> for ; morti devos çiu homo ; sed ne lia glor'.
'52 Ei man vera hildarleikur ; lokin enn at enda ; taka skulum vær dreingirnar ; og sama veg teir senda!"	'52 Ej må hildarleken vara ; lyckt ännu att ända ; taga skall vi gossarna ; och samma väg dem sända!	'52 Int bell stridar lätcen wårå ; slut ennu mi itta ; taga skaum gössa wi ; ö summu wejjem stcikka!"	'52 Eblas ne ke luktan ludon ; fermas fino jama ; knabojn prenu ni por sendi ; al la vojo sama."
'53 Sveinur svørð úr slíðrum dregur; Bjarni fram sær skundar ; "Tykir mær so vánt eitt verk ; at drepa børn sum hundar.	'53 Sven han svärd ur skidan drager ; Bjarne fram sig skyndar ; "Tyckes mig ett vådaverk ; att dräpa barn som hundar.	'53 Swen ån swörd ir toppi drar ; Bjarne fråm si blukör ; "Sekst a miga ljot jett werk ; tä drepa krippa läsö rakka."	'53 Svejno ingan glavon tiras ; Bjarno en rapido ; "Şajnas min fiago hunde ; mortigi homidojn.

'54 Njóta skulu dreingirnir ; grið imillum manna." ; Mongum líkar Bjarna orð, ; men Tróndur mælir annað.	'54 Njuta skulle gossarna ; skydd utibland mannar ; Många gillar Bjarnes ord ; men Trond måler annat.	'54 Njota skuldá gössar ; ... milla kallum ; mikklör tittca um Bjarnar wörd ; men Trond ser nö ellör.	'54 Devus knaboj ja ricevi ; pacon inter viroj." ; Multaj ŝatas Bjarnajn vortojn ; sed Trond alion diros.
'55 "Vísur maður er fyrrivarin; – høggið tit dreingirnar niður! ; Vaksa teir upp til valamenn, ; so býðst okkum eingin friður."	'55 "Viser mänska är företänkt, ; hugge ni gossarna ned! ; växer de upp till kämpamän ; så bjuds oss ingen fred."	'55 Wajsör menstca ir firiwar; – ögge ni gössa ni2d! ; Weksa dem upp a stri2dskallär ; sö bjödöst wöss inga fri2d."	'55 "Sağa homo antaŭatentas ; knabojn haku sen graco! ; Kreskos ĝis luktuloj ili ; al ni ne ofertos pacon."
'56 Ilskur gjørdist Bjarni tá: ; "Verði tú vargur í ve! ; Ikki skulu tit dreingirnar drepa ; heldur enn sjálvan meg!"	'56 Ilsker nog vart Bjarne då ; "Varde du varg i ve! ; lcke skall du gossarna dräpa ; hellre dräpe du mig!"	'56 Argör wart Bjarne do: ; "Warde du warg i wio! ; Intä skae ni gössa drepa ; eldör sjövån miga!"	'56 Koleriĝis Bjarno tiam ; "Estu vi maltotem!"<19> ; Ne mortigu vi la knabojn ; ol min prefere mem!"
'57 "Ikki var hatta vilji mín," ; Tróndur orðum vendir, ; "bara vildi eg royndir freista, ; hvørt tykkara hugur stendur.	'57 lcke var det viljan min," ; Trond han orden vänder ; "bara ville jag fresta att röna ; var eder hug ståndar.	'57 "Int war dedå wila måj" ; Trond ån wö2rd wendör ; "bara wildä ik röna fresta ; war ikkör u2g ståndör.	'57 "Tio ne estis mia volo" ; Trondo vortriparas ; "Mi nur volis provi kie ; via penso staras.
'58 Bjóða skal eg teim kostir teir, ; ið væl mugu eitast góðir, ; sjávr vil eg teir fostra upp ; og læra teir sið og lógir.	'58 Bjuda skall jag dem kosten deras ; som väl må heta duga ; själver vill jag dem fostra upp ; och lära dem sed och lagar.	'58 Bjoda skar ik dem jåtå deras ; sö wel mo jetta gwö2tt ; sjävör wil ik dem fostra upp ; ö lära dem sid ö re2tt.	'58 Manĝon ofertos mi al ili ; kaj aliajn favorojn ; mem edukos ilin mi ; instruos leĝojn, morojn.
'59 Kenna teim ítrótt og vápnaleikir, ; skaldamál og søgu. ; øllum teim a válinum stóðu ; líkti nú Tróndar røðu.	'59 Lära dem idrott och vapenlekar ; skaldamål och saga." ; Alla de som på vallen stod ; gillade nu Trond röde.	'59 Lära dem idrott ö wapnläka ; skaldarmol ö sagor" ; Öllör dem sö o swärde stodå ; tikktå nu um Tronda reda.	'59 Instruos sporton kaj armludojn ; poemojn kaj rakontojn." ; Ĉiuj bataleje starantoj ; ŝatis nun ruĝan Trondon.
'60 Heiðurliga teir hövdingarnar ; jarða undir fløtu. ; Tróndur tók so dreingirnar ; og færði norð í Gøtu.	'60 Hederliga de hövdingarna ; jordade under flatan ; Trond han tog så gossarna ; och förde norr till Gata.	'60 Ederlugt dem evdinga ; jordådå under flato ; Trond ån tog så gössa mi si ; ö ferd nord a Gatun.	'60 Estrojn ili nun honore ; kampe enterigis ; Trondo kun si prenas knabojn ; norden al Geŭto navigis.

Aldono 6-a. & Valdemara balado:

(&Rekantaĵo:

; Kantu forte ; frape paŝu dancon kaj ridetu ; belas nova tag' ; kantu forte.)

(&Melodio:

<1,45:29>

(#1: /lala sofa fami mifa; sola laso fami; lala sofa remi fala; sofa fami mire; dore mi mi; fami redo Tido remi La La; lala sofa mi; dore mi mi)?

(#2: fafa mire redo dore; mifa fami redo; fafa mire Tido refa; mire redo dore; mifa so so; laso fami remi faso mi mi; dodo dore mi; mifa so so)?

(#3: /lala lafa mimi mifa; soso sofa mimi; lala lafa rere refa; soso sofa mimi; mifa so so; la3la lala lala lala so so; dodo dore mi; mifa so so)?

(#4: /fafa fare dodo dore; mimi mire dodo; fafa fare TiTi Tire; mimi mire dodo; dore mi mi; fa3fa fafa fafa fafa mi mi; dodo dore mi; dore mi mi)

)

(&Strofoj:

,& Unua parto. Devenoj:

'1 /Venu jam kunigi nin ; en ĉendancon feroan ; ĉar ni historion konu ; kaj fieru heroan. (x: &Rekantaĵo)

'2 Nun aŭskultu jen baladon ; belan mi rakontos ; pri sinjoro kuraĝa kiu ; duran devon frontos.

'3 En Francujo hugenotojn ; reĝo persekutis. ; Fuĝis Langleoj de l' despoto ; kaj ekzilon salutis.

'4 En Svedujo poste loĝis ; bona arĥitekto ; ĉar lia prapatro fuĝis ; tien vivprotekten.

'5 Verkis fabelojn por infanoj ; kaj instruajn librojn ; Matilda Soederen' fraŭlino ; voĉis amajn vibrojn.

'6 "En Sudermanlando vivas ; arĥitekto sperta. ; Estrajn domojn kaj preĝejojn ; li konstruis lerta.

'7 Por norvega parlamento ; Emil desegnis domon. ; Plu famigis teatrejo ; Dramen lian nomon."

'8 "Svaton jesu, edziniĝu ; al sinjoro Langleo ; ne pro riĉo kaj prestiĝo ; sed familia kreo."

'9 Spetebihale post la nupto ; hejmon faris ili ; vivis honeste sen korupto ; kvar ŝi naskis filojn.

'10 Frato Filip inĝeniero ; kun Nobel' laboris ; poste pri konstruteĥniko ; Stokholme profesoris.

'11 Frato Abrahamo ĥemion ; diligente studis. ; Profesoro heliuman ; pezon li konkludis.

'12 Frato Aleksandro artisto ; rajdi ĉevalon ŝatis ; pentris mondon de ekzisto ; povas mi konstati.

'13 Valdemar' plej juna filo ; de Emil kaj Matilda ; kreskis intelekto brila ; en homamo milda.

'14 En Polujo judo juna ; kreis novan lingvon. ; Varsovie li eldonis ; per doto tiun atingon.

'15 Libron cenzuristo rigardis; en tempo de siringoj ; en la rusa, pola, germana ; franca kaj angla lingvoj.

'16 Unuan libron li al homoj ; diverslanden sendis ; kaj reagojn de ranguloj ; kun espero atendis.

'17 Dekkvinjara Antonina ; Esperanton lernis ; ĉar ne volis venkon finan ; atendi ĝis eterne.

'18 Skribis ŝi leteron kaj ; al Zamenhofo sendis. ; Lin kortuŝis vortoj ŝiaj. ; Bone respondendis.

'19 "En Simferopolo instruas ; mi ĝin al kamaradoj. ; Pensoj homaranaj influas ; dum la lingva studado.

'20 Ni nun esperanton kune ; ku2n ĝojo lernas. ; Volas generacio juna ; vivi mondon modernan."

'21 Venis vortoj de la majstro ; ankaŭ al Upsalo. ; Otto ordiniĝis pastro ; en la katedralo.

'22 "Valdemaro, ho studanto ; de l' universitato ; lingvon rigardu Esperanton ; certe vi ĝin ekŝatos."

'23 Valdemar' kaj Otto Zejdlico ; studis la novan lingvon. ; Ĉiu poste en sia ofico ; bone sin distingos.

'24 Ili societon faris ; por lingvo Esperanto. ; elektiĝis Valdemaro ĝia prezidanto.

'25 Ludoviko pensas pri ; homara paca pado: ; "Ĉu la lingvo Esperanto ; fariĝos monda movado?

'26 Mondolingvo Volapuko ; perdas da prestiĝo. ; Nurenberga klubo decidis ; esperantistiĝi.

'27 Volapukon trafis jam ; forlaso kaj disfalo. ; Klubon esperantan fondis ; junuloj en Upsalo.

'28 Dua klubo kaj unua ; por nur Esperanto, ; estu lumo por movado ; monde malgiganta."

'29 "Kara mia edzo, vi ; ne estu maltrankvila. ; Vian lingvon lernas jam ; anaro tuj multmila."

'30 De Valdemara balado nun ; jen parton la unuan ; finas ni sed dancos kune ; baldaŭ la parton duan.

,& Dua parto. Ruslandon:

'31 Jen Valdemaran parton duan ; kantos mi al vi tu2j. ; Valdemaro renkontis fruajn ; esojn en Rusu2j'.

'32 "Esperantistoj al Jalto venu!" ; anoncis Ilja Ostrovski. ; Pra-Pasportan Servon jenan ; devas mi agnoski.

'33 "En La Esperantisto amikojn ; lingvajn iu invitis" ; diris Valdemar' al Eriko ; "iru ni viziti.

'34 Kun kamaradoj mi jam fondis ; esperantoklubon. ; Tempas pri uzeblo respondi ; kaj forigi dubon.

'35 Planu ni vojaĝon kune ; trans la maro balta ; ek de Sankta Peterburgo ; ĝis la urbo Jalta."

'36 "Rusoj al Svedujo estas ; hereda malamiko" ; diris Eriko, "Ĉu atesti ; tion en praktiko?"

'37 "Malamikojn ĉu vi diru ; (tamen estas homaro)?(sed jen amikaro). ; Tra Rusujo ambaŭ iru ; ni al Nigra Maro."

- '38 Iris ek sur longa vojaĝo ; du studantoj svedaj ; pro krimea espa mesaĝo ; amikecon kreda.
- '39 Tra Finnlando li biciklis ; Sanktan Peterburgon. ; Esperanta parolo tiklis ; kun espo en tiu urbo.
- '40 Esperanton Erik ne sciis ; eke ne parolis. ; Dum veturo lernis li ; ĉar komuniki volis.
- '41 Ili veturis per fervojo ; Moskvon en rapido ; gastis faman Lev Tolstojon ; kun loka espa gvido.
- '42 Militon kaj pacon diskutis ; kaj cenzuron baran. ; "La Regno de Dio estas ene ; de vi, miaj karaj.
- '43 Donu preter egoismo ; spacon al la amo ; kiel fortojn adicias ; paralelogramo."
- '44 Valdemar' dankemas ĝoja ; pro la granda saĝo ; kiun dividis jen Tolstoj ; kaj kontente mesaĝas.
- '45 "En Rusujo kun amikoj ; ni spertas unuan fojon ; internacian lingvaplikon ; poste daŭrigos vojon.
- '46 Al Krimeo suna hastos ; ni trans montan alton ; ĉe Ilja Ostrovski gastos ; maran urbon Jalton."
- '47 Antoninan Ilja vokis ; "Venu al gastoj montri ; la plej belajn krimeajn lokojn ; kaj al ili rakonti."
- '48 En Krimeo kunestadon ; ĝuas tri semajnojn. ; Ĝis daŭrigas ili padon ; lingvofluon gajnos.
- '49 De Sevastopolo ŝipiras ; ili konatan adreson ; de esperanta pioniro ; Borovko en Odjeso.
- '50 Estis Nikolao la sama ; kiu el Varsovio ; ricevis la respondon faman ; pri Esperanthistorio.
- '51 Li kaj Antonina jam gvidis ; internacian voĉdonon ; kiun Odjesa klubo decidis ; pri reformpropono.
- '52 Dankis pro tio Zamenhof' ; ke ili grave agis ; lin, estontan teozofon ; kaj ŝin, kiu ĉion pagis.
- '53 Ĉiĉeronis Antonina ; kaj sen ajna dubo ; bone reprezentis sian ; Esperantoklubon.
- '54 "Valdemar', mi vidas ke ; vi ja ne estas danda. ; Eltriviĝis viaj ŝuoj ; pro paŝado planda."
- '55 "Kun vi kara Antonina ; urbon ni promenis. ; Multon interesan vidis ; ne piedojn trenis."
- '56 Nikolaon Bo2rovkon ; edziniĝis poste ; Antonina Ĉaikovska. ; Nupton ĝoje tostu!
- '57 En Odjeso Valdemaro ; kun Vladimir Gerneto ; akordiĝis pri refaro ; de monata gazeto.
- '58 "Ĉesis jam La Esperantisto ; ĉar mono mankas. ; Da abonantoj longa listo ; novan eldonon dankus.
- '59 Ĝi de Tolstoj publikigis ; verkon Prudento kaj kredo ; kio cenzuron rusan instigis ; ordoni ke ĝi cedu.
- '60 La cenzuro esperanton ; eldoni malpermesis ; sed revuon en bona kvanto ; svedoj povus presi.
- '61 Gazeton Lingvo Internacia ; parte mi financos. ; Preso estu tasko via ; jen nia alianco.
- '62 Per leteroj mi redaktos ; esperantogazeton. ; Eldonadon vi pritraktu ; ĝis dissendo pretos."
- '63 "Gazeton Lingvo Internacia ; presos mi kaj eldonos" ; diris Valdemar', "kaj mi ; amikojn helpajn konas.
- '64 Tiel glate ni evitos ; caran la cenzuron ; kaj forumon faros meritan ; por la nova kulturo."

'65 Ŝipon ili al Istanbulo ; serĉis el Odjeso ; sed ŝipestrojn ebrulojn ; volis tuj forgesi.

'66 Erik al maristo parolas ; "Serĉas ni ŝipon ; iri Konstantinopolon. ; Ĉu per via skipo?"

'67 "Nia ŝipestro kuŝas plankon ; eĉ ne povas stari. ; Brando ne estas lia manko" ; maristo fideklaris.

'68 Venis per rusa vaporŝipo ; Konstantinopolon. ; Ĉe Bosporo brilis urbaj ; turoj sur markolon.

'69 Aĥmed Paŝa ilin gastigis ; ridis rondaventra. ; Grand-sinjoro de l' kortego ; montris kion li pentras.

'70 "Restu pli longe en Hungarujo!" ; Valdemaro proponis ; "Ne, ni hejmen iru tuje!" ; Erik lin admonis.

'71 "Budapeŝto min ravas plu!" ; Valdemaro vokis. ; "Via monujo havas truon!" ; lin Eriko mokis.

'72 El Upsalo venas gazeto ; Lingvo Internacia. ; En la tuta mondo aperas ; neniu alia.

'73 Sur sin tiun taskon prenis ; Valdemar' Langle' ; doktoro Krikorc, Pol Nilen' ; kaj Alberj por ekspedo.

'74 Kvar klubanoj fondis ĝin ; kaj poste ili produktis ; dum kvar jaroj magazinon ; kiu lingve fruktis.

'75 Gazeton redaktas Vladimiro ; de distanco granda. ; Poŝti ĝin klubanoj iras ; por homoj diverslandaj.

'76 Nikolao trovis lokon ; en Sankta Peterburgo. ; Translokiĝis paro Borovko ; de lando de la sturgo.

'77 Al ili la revuon ; poŝto pakafe liveris. ; La Rusujan distribuon ; ili letere peris.

'78 Valdemaro pionira ; estas esperantisto ; kaj per spertoj li fariĝos ; bona ĵurnalisto.

'79 Valdemaran baladon ni jam ; finas parton duan ; kaj ni ĝian parton trian ; baldaŭ dancos bruan.

, & Tria parto. Revojaĝe:

'80 Nun de Valdemara balado ; kantos mi parton trian ; pri lia vojaĝado ; en mondo nia.

'81 Al Rusujo duan?rean fojon ; Valdemar' sopiras. ; Sanktan Peterburgan vojon ; li somere iras.

'82 Bonvenigis geborovkoj. ; En ŝia utero ; jam embriis Valdemara ; venonta amespero.

'83 Ĝojis Antonina kara ; kaj en ŝia sino ; kreskis jam por Valdemar' ; estonta dua edzino.

'84 "Aleksandro, frato mia ; vi ĉi tie restis. ; Ĉu Nobela ekspozicio ; tre sukcesa estis?"

'85 "Jes, mi la ornamojn faris ; pagon ricevis tu2j. ; Antonina la monon ŝparis ; ni iru al Italu2j'."

'86 Post Rusujo Budapeŝten ; venis Valdemaro ; vidi grandan ekspozicion ; de hungara miljaro.

'87 Li en Lingvo Internacia ; skribas artikolojn ; espe pri vojaĝoj siaj ; kaj amikaj paroloj.

'88 Al Rusujo trian fojon ; Valdemar' sopiras. ; Sanktan Peterburgan vojon ; li somere iras.

'89 Por li stampis la sveda konsulo ; rekomendan leteron. ; "Al ĉi tiu bona junulo ; fidu en aferoj."

'90 Li veturis per fervojo ; inter kamparanoj ; viziti grafon Lev Tolstojon ; en Jasnaja Poljana.

- '91 Devis ŝanĝi vagonaron ; li en urbo Tula ; ĉe preĝejo renkontis paron ; povran ĉifonulan.
- '92 Lev lin bonvenigis kore ; en sia vilaĝo ; kaj dividis kaj palacon ; kaj profundan saĝon.
- '93 Demandis li de Lev moralon ; post malvenko ŝaka : ; "Kiel ĝuste agi sen falo ; en malĥristan vakon?
- '94 Mizerulan paron renkontis ; mi ĉe preĝejo dorman. ; Riĉa mi junulo hontis ; pri almozo norma."
- '95 Lev respondis kun okuloj ; fajrobriple viglaj ; "Ni ne kapablas vivi sanktule ; tio vivon siglas."
- '96 Sergej Aleksandroviĉ' ; tatara ĥana pranepo ; helpon al Valdemar' dediĉis ; sur kozaka stepo.
- '97 Juĝisto Dmitri Ivaniĉ' ; kaj vilaĝa atamano ; trovis por li taŭgajn kondiĉojn ; ĉe Filonovskajanoj.
- '98 Kun kozakoj vivi li volis ; en maleleganto. ; Kun Sergej' kaj Dmitri parolis ; nur en esperanto.
- '99 Pluge, rikolte, draŝe laboris ; li ĉe kozakoj pene. ; Supon kaj nigran panon voris ; vekiĝis frumatene.
- '100 Rusan stepon sur ĉevalo ; Valdemar' vojaĝos ; post restado radikala ; en kozaka vilaĝo.
- '101 Sur ĉevalo Zakaulok ; rajdis li horizonten. ; Rusan kamparanan gastamon ; ĉie li renkontis.
- '102 Sur Zakaulok rajdis al nordo ; li dum sunis kaj blovis ; kaj ĉe ĉiu kampula pordo ; koran gastamon trovis.
- '103 Kampulojn, amikojn kaj princinojn ; gastis li sur vojo. ; Post riveroj kaj ravinoj ; revenis al Tolstojo.
- '104 "En mia dudekkvina jaro" ; diris Valdemaro ; "rajdis mi kozakan ĉevalon ; ĝis Balta Maro.
- '105 Mi dum iro spertis pravon ; ke stampita letero ; al ŝtatano pruvas gravon ; de bezona afero."
- '106 Jarcentfinon esperanta ; unua edziĝo vestas. ; Signe Blumberj el Finnlando ; kaj Valdemaro festas.
- '107 "Mielmonate ni vojaĝu ; foran Samarkandon. ; Rusa registaro omaĝon ; donos tra la lando.
- '108 Pro letero de reĝo Oskaro ; nia grupo disponos ; tra imperio de rusa caro ; mem fervojvagonon.
- '109 Vi nin sekvu en vojaĝo ; frato Aleksandro. ; Bildojn pentru de vilaĝoj ; kaj riveraj meandroj."
- '110 Signe al li naskis filojn ; bele sane kreskis ; juna Lars kaj aĝa Emilo ; bone adoleskis.
- '111 En la granda imperio ; de la rusa caro ; fermentiĝas revolucio ; en la laboristaro.
- '112 Valdemaro ĝin atestis ; en aparta libro ; kiel popolon trupoj molestis ; murde per kalibrojo.
- '113 "Se maltaŭga registaro ; civitanojn murdas ; al iliaj pledaj deklaroj ; oni restu surda."
- '114 Fondon de sveda esperanto;federacio gvidis ; Valdemaro kaj sen vanto ; poste ĝin prezidis.
- '115 Verkis Valdemaro pri ; milito en Balkano. ; Por la monda katastrofo ; estis ĝi la ĉano.
- '116 En la mondmilito logis ; Finnlandon liberiĝi. ; Ilin Valdemar' apogis ; kampanjis li prestiĝe.
- '117 Dum la rusa revolucio ; al finnoj libero venis. ; Valdemaro helpis tion ; kaj ricevis ordenon.

'118 Trian jaron de la paco ; mortis lia Signe. ; Vivo estas nur donaco. ; Enteriĝis digne.

'119 Valdemaro al Rusujo ; ĵurnaliste iras. ; Antoninan li renkontas ; ŝi problemojn diras.

'120 "Kara mia Nikolao ; patro ilia mortis ; kiu al ni vivsekuron ; kaj monon hejmen portis.

'121 Ĉu vi povas al Svedujo ; mian filinon preni ; ke mi povu la aliajn ; sola en vivo teni?"

'122 "Nina venu al Stokholmo ; plu muzikon studi. ; Ĉe mi", diris Valdemaro ; "povos pianon ludi."

'123 Enamiĝis Valdemaro ; kaj la juna Nina. ; Ŝi fariĝis post du jaroj ; lia novelino.

'124 Mi la trian parton nun ; rakontis Valdemaran ; kaj ni poste dancos kune ; ankaŭ la parton kvaran.

,& Kvara parto. Hungarlandon:

'125 Nun mi kantos kvaran parton ; pri Valdemar' kaj Nina. ; Mondo tre malbone fartos ; pro malamo kulmina.

'126 Lernis Esperanton frue ; Valdemar' kaj legis. ; Li dek unu lingvojn flue ; kaj parolis kaj legis.

'127 Germanujon humiligis ; la venkintoj militaj ; kio kontraŭreagon instigis ; civilizon spitan.

'128 Eĉ pli Hungarujon rabis ; paco Trianona. ; Restis por miljara nabo ; lando nur triona.

'129 En sia kvindeknaŭa jaro ; rajdis Valdemaro ; puston longe sur ĉevalo ; tra lando de hungaroj.

'130 Rajdis Valdemar' ĉevalon ; tra hungara lando ; por ekkoni ĝin pli bone ; ol de fervojrando.

'131 Ekinstruis li svedan lingvon ; en universitato ; kaj studentojn judajn ŝirmis kontraŭ rasismaj batoj.

'132 Li en Budapeŝto laboras ; en lingva fakultato ; kaj rimarkas ĉe ĥristanoj ; mankon de kompato.

'133 Post verkado, tradukado ; kaj kontakta kreo ; fariĝis li de l' ambasado ; kultura ataŝeo.

'134 Adolf Hitler sen skrupuloj ; homojn tre malamas. ; Kontraŭ judoj, maldekstruloj ; amasparoloj flamas:

'135 "Judoj kaj ciganoj estas ; senvaloraj rasoj. ; El ili neniu restu ; pace ni ne lasu.

'136 Al ni arjoj ankaŭ slava ; raso malsuperas. ; Jes, la onidiroj pravas ; ili ne prosperos."

'137 Nazia partio sen kompato ; homojn malestimas. ; Judoj, slavoj, demokratoj ; regon ilian timas.

'138 Pli da teritorio postulas ; nazia retoriko. ; Libroj brulas, kapoj rulas ; antaŭ la svastiko.

'139 Polojn Germanujo atakas ; grakas generaloj. ; Dua mondmilito diskalkas ; landojn al bataloj.

'140 "Diplomatoj sovetaj foriru!" ; Hungarujo postulas. ; Valdemar' eskortis ilin ; sekure ĝis Istanbul.

'141 Hungarujo sendas trupojn ; lukti kontraŭ rusoj ; por eviti germanan okupon ; kiel aŭstroj ĵuse.

'142 Stalingradon germanoj tuŝas ; en batalo decida. ; Ilin de tie rusoj repuŝas ; okcidenten rapide.

'143 Martan tagon la nazioj ; faras hungare puĉon. ; Valdemaro vidas defion ; "Komenciĝos buĉo."

'144 Valdemaro kaj Per Anger ; en ambasado sveda ; antaŭvidis regi sange ; nazia murdobsedo.

'145 "Adolf Ajhmann el Germanujo ; venis forigon gvidi. ; Judojn li kolektas tuje ; sendos al perfido.

'146 Judojn for nazioj portas ; en tro malgranda spaco. ; En vagonoj centoj mortas ; pro premiĝo kaj laco.

'147 Mi ne mem atestis tion ; sed aliaj vidis ; kaj al ni rakontis ĉion. ; Dume neniu ridis.

'148 Malantaŭ ŝlositaj klinkoj ; en kunpremo merda ; plurajn tagojn eĉ sen trinko ; multaj prudenton perdas.

'149 Ĉu ni povas helpi homojn ; resti en sekuro ; kaŝi sin en ŝirmaj domoj ; for de sanga spuro?"

'150 "Mi pasporton doni povas ; se iu rilaton ; por si al Svedujo trovas ; ankaŭ nur privatan."

'151 Al Per Anger Valdemaro ; respondas per informo. ; "Necesas nun vivsava faro ; ekster kutima normo.

'152 Karlo Luc en ambasado ; svisa simile faras. ; Registaron li persvadis. ; Kartoj arestojn baras.

'153 Kaŝas li homojn de arestoj ; en eksa fabriko vitra ; ŝirmas ilin de molestoj ; kaj mortigoj arbitraj.

'154 Kaj mi tiel same faros ; kvankam kontraŭ juro. ; Homojn kaŝi ni preparos ; inter amikaj muroj."

'155 Diris Per aserton pravan ; "Helpu, jes, per domoj ; rajton vivi ĉiuj havas; homoj estas homoj."

'156 "Homoj estas homoj, ĉiuj ; havu rajton vivi" ; diris Per, "Vi helpu al tiuj ; provu ni intensive.

'157 Sagokrucanoj homojn ĝenas ; akre kaj minace. ; Valdemar' kaj Nina penas ; aŭdace kaj senlace.

'158 Valdemar' maljuna bravas ; kontraŭ ili kuraĝi. ; "Ili ne igu mortigejen ; homojn alvojaĝi."

'159 En sia sepdekdua jaro ; en ombro de milito ; taskon sur sin Valdemaro ; prenas teruron spiti.

'160 Valdemar' kaj Nina Langleo ; kaŝas multajn homojn ; ĉe amikoj malobee ; en privataj domoj.

'161 Helpas homoj al la paro ; en la savaj agoj. ; Multaj homoj ordinaraj ; laboras ja sen pago.

'162 Kelkajn kaŝas ĉe monaĥojn ; kelkajn en lernejoj. ; Ilin flegas kaj prizorgas ; kiom eblas pleje.

'163 Savoreta transporta servo ; havas eĉ ŝarĝaŭton ; kaj kampare manĝaĵrezervon ; ne preparolu laŭte.

'164 Per hungara amikaro ; judojn save kaŝas ; ili kaj ĉion eblan faras. ; Morto strate paŝas."

'165 Nun de balado Valdemara ; kaj pri brava Nina ; finas ni la parton kvaran ; kaj tuj dancos kvinan.

,& Kvina parto. Ruĝakruce:

'166 Finis ni la parton kvaran ; kaj nun ekas kvinan. ; Alparolis Valdemaron ; lia edzino Nina.

'167 "Grafo Folke Bernadot' novas ; en Ruĝakruca estraro. ; Ĉu ni lin interesi povas ; veni ĉe hungarojn?"

- '168 "Kara Nina, bona ideo" ; Valdemar' respondis ; " li estos brila korifeo ; Ruĝan Krucon fondi."
- '169 Eksterlandan ministerion ; Valdemar' entretis ; ĝeneralan sekretario ; li renkonti petis.
- '170 "Graŝon akceptu Bernadoton. ; Helplaboro gravas ; Ruĝa Kruco Sveda fondota ; urĝe homojn savos."
- '171 "Ne ricevus li permeson ; tra Germanujo veni ; sed mi pensas ke sukcesos ; vi la gvidon preni."
- '172 "Ruĝan Krucon ankaŭ ĉu mi ; devas reprezenti ; por al homoj helpi dume ; en militaj turmentoj?
- '173 Ruĝan Krucon certe mi do ; devos organizi ; por al homoj kun rapido ; doni vivprovizojn."
- '174 Sur maljunajn ŝultrojn prenas ; Valdemar' la gvidon. ; Tio sagokrucanojn ĝenas. ; Planas ili perfidon.
- '175 Sagokruco kaŝejojn serĉas ; por fuĝantojn trovi. ; Kaptatoj multajn larmojn verŝas ; ĉar sin kaŝi ne povis.
- '176 "Homojn la nazioj kaptas ; estas granda krizo. ; Kara Nina, ni adaptu ; nian organizon.
- '177 Ĉi leterojn ni eldonu ; kvazaŭ fotan pasporton. ; Povas ĝi protekti homon ; kontraŭ bruta morto.
- '178 Homon savos tia ĉi ; letero de protekto. ; Sagokrucano ne kuraĝos ; tiun jam difekti.
- '179 Montris vojon Karlo Luco ; kiel deportojn eviti. ; Fridriĥ Born de Ruĝa Kruco ; age lin imitis.
- '180 Konstantino Karadja rumano ; Anĝel Sanz-Briz hispano ; Anĝel Rotta de Vatikano ; laboras kun sama plano.
- '181 Jeson al kvarcent protektoletoj ; aŭtoritato donas ; kvankam eskapi de danĝeroj ; multaj pli bezonas.
- '182 Oficeje stampu paperojn ; kiel vivsavilojn. ; Ruĝakrucajn protektoletojn ; havu multaj miloj.
- '183 Al uniformulo ĝi ; imponos per bela stampo. ; Ĉu ĝi vere validas, tion ; kaŝu inter krampoj.
- '184 Oni dokumentojn respektos ; de Ruĝa Kruco Sveda ; juran bazon ne suspektos ; kaj arestojn cedos."
- '185 Sagokrucanoj leterojn grumbas ; de Ruĝa Kruco Sveda ; sed ne scias ke juro stumblas ; ilin validaj kredas.
- '186 Karlo Luc, Anĝelo Rotta ; Konstantino Karadja ; kaj Valdemaro judojn kvotas ; eviti regon sovaĝan.
- '187 Helpis al Anĝel Ĝorĝo Perlaska ; post la puĉo dua ; por ke protekto ne fiasku ; en batalo brua.
- '188 Koncentrejon Birkenaŭon ; du kaptitoj fuĝis. ; Ili raporton verkis baldaŭ ; kies mesaĝo muĝos.
- '189 Ĉasis ilin la nazioj ; veron por estingi. ; Tamen hungarajn judajn estrojn ; tiu raporto atingis.
- '190 Juda kontraŭstara ligo ; volis ne paroli ; pri timiga koleriga ; aŭŝvicprotokolo.
- '191 Filip fon Frojdiger vokas ; "Legu jen raporton! ; Adolf homvaloron mokas ; puŝas nin en morton.
- '192 En la koncentrejo nazioj ; judojn amase gasas ; milojn mortigas pro nenio ; vivi neniun lasas."

'193 "Montru!" Valdemaro diris ;
"Jen do la fina flanko. ; Pri la judaj
sortoj ni miris. ; Nun ni scias,
dankon.

'194 Ĉi raporton mi tradukos ; kaj al
reĝo sendos. ; Gustav estas mia
amiko. ; Ni reagon atendu."

'195 Danielson ambasadestro ; ne
raporton kredis. ; "Elrigardu tra
fenestro ; maleblas tiel procedi.

'196 Sesdek mil homojn jam ; en
majo, ne povas esti. ; Demandu al
registaro tamen ; ĉu oni tion
atestis."

'197 Valdemar' al oficiro ; petas
klarigi ombron. ; "Ĝeneralstabano,
ni miras ; ĉu ne troas ĉi nombro?"
.....

'198 "Okdek mil homojn ili ; jam
vagonare forportis. ; Ĉiusemajne
dudek kvar mil ; pli dividas ĉi
sorton."

'199 Fine Valdemar' sukcesas ;
sendi la leteron. ; "Ho, Gustavo, mi
promesas ; ke ĝi diras veron.

'200 Hajnriĥ Himler gvidas en regno
; judan finan solvon. ; Ili laŭ la
granda desegno ; fariĝos fumo kaj
polvo."

'201 Skribis al Horti Mikloŝ Gustavo
; Valdemar' transdonis ; kaj parolis
pri hasto grava ; al ŝtatestro
imponis.

'202 "Horti, deportojn malpermesu ;
el Hungarujo judajn ; ke
amastransportoj ĉesu ; kaj mortigoj
krudaj."

'203 "Bone ke vi al mi venas ; kun ĉi
reĝa mesaĝo: ; Ĝin mi serioze
prenas ; kun registara engaĝo."

'204 Malpermesis registaro ; judojn
fortransporti ; baldaŭ post la
Valdemara ; pledo ĉe Mikloŝ Horti.

'205 Pro la reĝa telegramo ; de
Gustavo Kvina ; ili ne sendas judojn
al flamoj ; en bruligo fina.

'206 Skribas Valdemar' leteron ; al
Karlo princo. ; "Moŝto, helpon
konsideru ; kontraŭ ekstermo
grinca.

'207 Por la Ruĝakrucaj pagoj ; ni
bezonas monon ; kaj pro multaj
helpaj agoj ; pliajn kvar personojn."
.....

'208 "Pensas mi, akceptu vi ;
nespertan ĉi Raulon. ; Per vi ambaŭ
ja evitos ; multaj homoj brulon."

'209 Venis Raul Valenberj' ; ĥaosan
Budapeŝton ; kaj instruis lin Per
Anger ; eluzi konsulveŝton.

'210 Rajtas Raul fari veran ;
ambasadpasporton. ; Multajn li
elskribas, homoj ; do eskapas
morton.

'211 Raul' ricevis multan monon ;
de judoj en Usono. ; Kredis rusoj do
ke estis ; li usona spiono.

'212 Valdemaro de Ruĝa Kruco ;
neniun monon ricevis. ;
Kunlaborantojn preskaŭ ducent ;
estri sen ĝi li devis.

'213 Savas Raulo per pasportoj ;
nur ĉasatajn judojn. ; Valdemaro
savas ĉiajn ; homojn sen ekskludo.
.....

'214 Kanto pri Valdemar' kaj Nina ;
longe jam progresas ; jam ni dancis
parton kvinan ; kaj baldaŭ dancos
sesan.

,& Sesa parto. Militfine:

'215 Faris Valdemar' kaj Nina ;
savlaboron sukcesan. ; Jam ni
dancis parton kvinan. ; Venas parto
sesa.

- '216 En aŭtuno rusa avanco ; Germanujon minacos. ; Horti finas aliancon ; kaj proklamas pacon.
- '217 Sagokruco puĉon faras ; en la sama tago. ; Nun neniu rajto staras ; kontraŭ teroragoj.
- '218 Oni malpermesis judojn ; eliri el la ghetto ; sed kadavrojn en Danubon ; ĉiutage ĵetas.
- '219 Nina en Monaĥinejo ; de la Sankta Koro ; kun estrino Hildegardo ; nokte savlaboras.
- '220 Malfermiĝas pordo subite ; "Vivu Salaŝio!" ; krias deko da plenarmitoj ; kelkaj en ebrio.
- '221 "Ha! Por tiaj paperoj malbenaj ; tuta jen fabriko. ; Ni judaĉojn ĉiujn prenas. ; Vi vin identigu!"
- '222 Vipas kaj tablon pistole martelas ; ili kaj blasfemas ; monon kaj ornamaĵojn ŝtelas ; monaĥinoj tremas.
- '223 Postan tagon ili revenas
... ĝenas
- '224 Sagokrucanoj sen uniformo ; murdas en amoko. ; Oni ne du noktojn dormu ; en la sama loko.
- '225 Sagokruco Valdemaron ; al morto juĝas ; ĉar li vivpereon baras ; por multaj kiuj fuĝas.
- '226 Sagokruco jam lin ĉasas ; kun mortiga celo. ; Valdemar' malsana kuŝas ; en malvarma kelo.
- '227 Flanken la kurtenon tiras ; bruto plenarmita. ; Valdemar' rigardas kun ; indiferento spita.
- '228 Bruto lin rigardis zorge ; ĝis el iu angulo ; iu diris "Estas nur ; malsana maljunulo."
- '229 Estis lia ŝanco bona ; ke razado mankas. ; Lin brutulo ne rekonas ; pro la barbo blanka.
- '230 El la kela ĉambro tiu ; bruto re eliras. ; "Ĉu Langleon trovis vi?" ; brutkamarado miras.'231 "Ne, li ne estas tie" ; respondis la unua. ; "Ĉu vi certas? Mi ne kredas!" ; diris tuj la dua.
- '232 Enrigardis ankaŭ la dua ; zorge Valdemaron ; sed ne povis identigi ; lin tiu barbaro.
- '233 Enrigardis bruto dua; por certecon havi. ; "Mi ne povas lin rekoni ; vi do tamen pravis."
- '234 Tiel sub milita vintra ; budapeŝta korto ; Valdemar' saviĝis de ; la sagokruca morto.
- '235 Malkonate li aspektis ; pro vizaĝo barba. ; Tial ne kaptiĝis li ; de Morto murde varba.
- '236 Budapeŝton ĉirkaŭprenis ; soveta sieĝo. ; Anoj sagokrucaj ĉagrenis ; urbe en la neĝo.
- '237 Konkeris Budapeŝton ; soveta armeo. ; Pluvivantojn de juda ghetto ; savis de pereco.
- '238 Rodja Malinovskij malferma ; urbo ĝin deklaris. ; Ĉion ajn soldatoj rajtas ; sen puno fari.
- '239 Nina diris "Monaĥinojn ; la soldatoj perfortos. ; Ruĝakrucajn vestojn ŝirme ; mi al ili portos."
- '240 Baldaŭ soldatoj rusaj venis ; tra la doma pordo ; kaj komencis virinojn ĝeni ; en minaca ordo.
- '241 Al soldatoj Nina kriis ; ruse per forta voĉo ; "Ĉu vi helpantojn sindonajn perfortos? ; Meritas vi riproĉon!"
- '242 Junaj soldatoj al ŝi respondas ; haltis preskaŭ plore ; "Estimata patrino, ni hontas ; nin pardonu elkore!"
- '243 Raul' ne kredis ke danĝeris ; por li soveta flanko ; sed ĉe rusoj malaperis ; kaj mortis en Lubjanko.

'244 En printempo paco sonis ;
ĉesis jam pafado. ; Nova registaro
ordonis ; forlasi ambasadon.

'245 Paro Langle' Svedujen venas ;
sen eĉ unu groŝo. ; Sin vivteni ili
penos ; kun malplena poŝo.

'246 Libron li verkis, Agoj kaj tagoj ;
en Budapeŝto , kaj mendis ; helpon
per aŭtora pago ; kaj Hungarujen
sendis.

'247 Ĥaason en Budapeŝto ; libre
Nina rakontis ; pri danĝeroj tre
honeste ; kiel homoj volontis.

'248 Oficiala rekono mankis ; por
Valdemar' kaj Nina ; sed honore oni
dankis ; ĉi heroojn fine.

'249 Ricevis de Ruĝa Kruco
medalon ; ordenon de Norda Stelo ;
justuloj inter la popoloj ; deklaris
Israelo.

'250 Se vi povas pli rakonti ; pri
Langlea faro ; strofon verku por
tondrona ; balado Valdemara.

'251 Jen baladon Valdemaran ;
kantis mi kaj prave ; kaj la lingvon
tuthomaran ; kaj multajn vivojn li
savis.

'252 Nun mi finas la baladon ; veran
Valdemaran. ; Lian nomon tenu
ĉiam ; en memoro karan.)

◀ *Notoj valdemaraj:*

'1 En Feroaj Insuloj travivis ĝis
moderna tempo malnova tradicio
ĉendanci baladojn.

'3 Hugenotoj estis kalvinistoj,
viktimoj de religiaj masakroj, kiuj
ekde jaro 1685 amase forlasis
Francujon. Cento el ili alvenis al
Svedujo.

'5 Mathilda Söderén (1832–1904),
eldonisto kaj verkisto.

'6 Svede "Södermanland" aŭ
"Sörmland", provinco sveona
sudokcidentaŭ Stokholmo.

'7 Emil Viktor Langlet (1824–1898),
arĥitekto.

'9 Spetebyhall, bieno en
sudermanlanda paroko Lerbo apud
Katrineholm'. Nupto estis en 1864.

'10 Filip Langlet (1866–1950),
laboris konstruiste ĉe Robert Nobel
dum 1890–1893 kaj sekretario ĉe
Alfred Nobel 1896-1897 kaj 1899–
1937 instruis en Teĥnika Altlernejo
de Stokholmo.

'11 Abraham Langlet (1868–1936),
doktoro pri ĥemio, instruis en
Chalmers Teĥnika Altlernejo en
Gotenburgo 1896–1933. Grafologo.

'12 Alexander Langlet (1870–1953),
artista kaj multjara prezidanto de
Gotenburga Artista Klubo.

'13 Valdemar Georg Langlet (1872
decembre 17-an –1960 oktobre 16-
a), pionira svedespo kaj ĵurnalisto.

'14 Ludwik Lejzer Zamenhof (1859-
1917) eldonis Unuan Libron en
1887.

'17 Antonina Ĉajkovska (1872-
1948), pionira rusespo.

- '21 Otto Zeidlitz (1860-1943), svedespa multlingvulo, pastriĝis en 1888.
- '22 V. studis en Upsala universitato dum jaroj 1891-1894.
- '24 Upsala Klubo Esperantista fondiĝis en 1891.
- '26 Planlingvon Volapük publikigis inventis kaj publikigis germana pastro Johann Martin Schleyer en jaro 1879. ; Klubo germane "Nürnbergger Weltsprachenverein" en 1888 forlasis Volapukon por Esperanto.
- '30 Laŭbezone anstataŭu la vorton "baldaŭ" vorto "poste", "tuj" aŭ "nun".
- '32 Ilja Ostrovski (1855–1910+?), kuracisto, anoncis en monata gazeto La Esperantisto en 1895 bonvenigon en sia domo.
- '33 "La Esperantisto", plej unua espa gazeto, eldoniĝis en Nurenbergo, Germanujo, dum jaroj 1889-1895. ; Erik Etzel, kamarado de V. en Upsalo.
- '39 Sinjoro W. Waher scipovis paroli nur estone, ruse kaj espe. Kun li V. unuafoje parolis espe sen alia lingvo ebla.
- '41 Lev Tolstoj (1828-1910), grafo kaj verkisto ; Inter la moskvaj rusespoj kiuj akompanis la svedojn menciigis nomo Puĉkovski.
- '42 Ruse "Vojna i mir", kvar volumoj de Lev Tolstoj 1865–1869 ; "Carstvo Boĵije vnuri vas" 1894, malpermesita de la rusa cenzuro.
- '43 Ĉi tiun rezonon de Tolstoj citas V. en "Till häst genom Ryssland" ("Sur ĉevalo tra Rusujo") 1898, sur paĝo 46.
- '47 Antonina rakontis krimeajn popolfabelojn, kiujn V. poste publikigis en sveda gazeto.
- '49 La vaporŝipo nomiĝis Miĥail. ; Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1863–1913), instruisto, ĵurnalisto kaj pionira rusespo.
- '50 Nikolao Borovko sendis al Z. leteron en 1895(?) demandante kio kondukis Z.on al esp. La respondon Vladimir Gernet el la rusa tradukis en esperanton kaj publikigis en Lingvo Internacia.
- '51 Tiu voĉdono okazis en 1894.
- '57 Vladimir Gernet (1870–1929), pionira rusespo, ĥemiisto kaj vinberinstitutestro.
- '59 En la dua numero de 1895.
- '65 Du vaporŝipojn ili malelektis pro la drinkemo de ties anglaj ŝipestroj. Ili iris per ŝipo Jekaterina II.
- '69 Ahmed paŝao, membro de Grand-sinjora Kortego de la sultano de Otomana Imperio.
- '73 "Lingvo Internacia" eldoniĝis en Upsalo 1895–1899, poste alilande. Unue faris ĝin V., d-ro Krikortz, Paul Nylén (1870-1958) kaj P. Ahlberg.
- '81 La dua rusa vojaĝo de V. estis en jaro 1896.
- '82 Nina Borovko-Langlet (1896–1988) naskiĝis en aŭgusto baldaŭ post la dua vizito de V.
- '84 Aleks laboris por petrolea ekspozicio de Nobel.
- '85 Poste Aleks kaj V. kune vojaĝis al Polujo, Hungarujo kaj Italujo.
- '86 En Budapeŝto oni festis en jaro 1896 mil jarojn post la "landpreno" de Hungarujo.
- '88 Estis en jaro 1897.
- '90 Jasnaja Poljana ("Luma Kampo"), vilaĝo 180 kilometrojn sudob Moskvo.
- '93 Tiun gravan por li interparolon priskribas V. en sia libro "Till häst genom Ryssland", paĝojn 79–84.

- '96 Sergej Aleksandroviĉ, rekta prapranepo de Ŝahin Ĥan Geraj kaj tronheredunto de Tatarujo Krimea.
- '97 Dmitri Ivaniĉ, vilaĝa paca juĝisto en Filonovskaja en 1897. ; La atamano, tio estas kozaka estro, nomiĝis Pugaĉev ; Filonovskaja, vilaĝo en Don-kozaka regiono, 680 kilometroj sudorientob Moskvo.
- '99 En Filinovskaja V. loĝis kun la familio de Pavl Stepaniĉ Fokin kaj liaj edzino Marja Varfolomejevna, filino Ŝurenka, fileto Ivan, patrino Olga Markovna, fratino Dunja, bofrato Avrelian kaj ilia dekkvinjara filino Vanda.
- '106 Signe Paulina Blomberg (1876-1921), flegistino, filino de Karl Evert Blomberg kaj Paulina Grosskopf, edziniĝis al V. en sia hejmurbo Åbo (suome Turku), Finnlando, tiama Rusujo, en 1899.
- '108 Oscar Dua (1829–1907), reĝo de Svedujo 1872–1907 kaj de Norvegujo 1872–1905.
- '110 Emil Langlet (1900–1966), Lars Langlet (1903–1981).
- '112 Svede "Om revolutionsrörelsen i Ryssland" ("Pri la revolucia movado en Rusujo") 1906, pri jaro 1905.
- '114 Sveda Esperanto-Federacio fondiĝis en 1906. V. estis ĝia prezidanto ĝis 1909.
- '115 Svede "Om kriget på Balkan" ("Pri la milito en Balkano") 1912.
- '117 Svede "Frihetskorsset av tredje klass", suome "Vapaudenristin ritarikunta", 1918. Finnlando sendependiĝis en 1917.
- '119 V. iris al Moskvo en 1923.
- '123 V. kaj Nina geedziĝis en 1925.
- '128 Laŭ Traktaĵo de Trianono la 4-an de junio 1920 Hungarujo perdis 72 procentojn de sia teritorio kaj 62 procentojn de sia loĝantaro.
- '129 V. rajdis 1500 km-ojn tra Hungarujo en 1931. Svede "Till häst genom Ungern" 1934.
- '131 Ek de 1932 V. instruis la svedan en Pálmány Péter universitato en Budapeŝto.
- '133 V. estis nepagata sveda kultura ataŝeo en Budapeŝto 1938–1944.
- '134 Adolf Hitler (1889–1945), nazia partiestro 1921–1945 kaj diktatoro de Germanujo 1933–1945.
- '136 Arja, el sanskrita vorto por "nobla", nazie signifas ana al la propra (germana) "raso", ĝenerale homo helkolora haŭte, hare kaj okule.
- '138 Svastiko, aŭ hoka kruco, antikva sunsimbolo, uzita por nazia partio.
- '139 Germanujo invadis Polujon en 1939 septembre 1-an.
- '141 Germanujo okupis Aŭstrujon en 1938 marte 12-an.
- '142 Batalo de Stalingrad (antaŭe nomata Caricin, poste Volgograd) daŭris de 1942 aŭguste ĝis 1943 februare.
- '143 Germanoj puĉis Hungarujon 1944 marte 19-an.
- '144 Per Anger (1913–2002), sveda diplomato.
- '145 Adolf Eichmann (1906–1962), alta oficiro de nazia polico Schutzstaffel.
- '152 Carl Lutz (1895–1975), svisa diplomato.
- '157 Hungare "Nyilaskeresztes Párt – Hungarista Mozgalom", hungara nazieska partio dum 1935–1945.
- '167 Folke Bernadotte (1895–1948), sveda princido kaj grafo. Lin murdis

israelanoj en Jerusalemo dum lia pacmisio por Unuiĝintaj Nacioj.

'169 La ĝenerala sekretario de la eksterlanda ministerio nomiĝis Arnóthy-Jungert.

'179 Friedrich Born (1903–1963), svisa diplomato, delegito de Internacia Komitato de Ruĝa Kruco de majo 1944 ĝis januaro 1945.

'180 Constantin Karadja (1889–1950) rumana diplomato ; Ángel Sanz-Briz (1910-1980) hispana diplomato ; Angelo Rotta (1872–1965), apostola nuncio.

'187 Giorgio Perlasca (1910–1992), itala negocisto.

'188 Vrba-Wetzlerraporto, 1944 aprile, unu el la "Auschwitz-protokoloj", verkita de eskapintoj de Birkenau, nome Walter Rosenberg alias Rudolf Vrba (1924–2006) kaj Alfréd Wetzler (1918-1988).

'191 Pinchas Freudiger (??–19??), ekleziestro kaj membro de Juda Konsilantaro en Budapeŝto.

'194 Gustaf Kvina (1858–1950), reĝo de Svedujo 1907–1950.

'195 Ivan Danielson (1880–1963), sveda diplomato.

'200 Heinrich Himmler (1900–1945), estro de nazia polico Schutzstaffel dum 1929–1945. '201 Horthy Miklós (1868–1957), hungara ŝtatestro dum 1920–1944.

'206 Prins Carl (1861–1951), reĝido de Svedujo, estro de Sveda Ruĝa Kruco 1906-1945.

'209 Raoul Wallenberg (1912–1947), sveda diplomato.

'217 Sagokruca puĉo okazis 1944 oktobre 16-an.

'220 Ferenc Szálasi (-1946), estro de Sagokruca Partio 1932-1946, mortpunita.

'226 Ĉi epizodon priskribas Björn Runberg en sia libro "Valdemar Langlet – räddare i faran" ("V. L. – savanto en la danĝero") 2000, paĝon 37.

'237 Soveta armeo prenis Budapeŝton en 1945 januare 16-an.

'238 Rodion Malinovskij (1898 – 1967), soveta marŝalo kaj ministro pri defendo 1957-1967.

'242 Pri ĉi epizodo Nina foje parolis, diris Pieter Langlet kaj Monika Langlet-Forsberg, genepoj de V., en 2015 aprile.

'243 Lubjanko, malliberejo en Moskvo kaj centro de soveta spiona agentejo NKVD, poste nomata KGB. Supozeble tie en 1947 Raul' mortis.

'246 Svede "Verk och dagar i Budapest" 1946. La monon pro la libro V. uzis por sendi krizan helpon al Hungarujo.

'247 Svede "Kaos i Budapest" 1982, espa traduko en 2001.

'249 Svede "Röda Korsets silvermedalj" 1946 ; "Nordstjerneorden" 1949? ; hebree "Hasid Ummot Ha-'Olam", "Jad Vaŝem" 1965.

'251 Oni taksas ke la Langlea agado en la militfino savis inter dekmil kaj dudek mil homojn, sed eble pli.

>

Fino

ĈĜĤĴŜ ŭ ĉĝĥĵŝ ŭ Üßü ÇĔİŒÇęĕïœ
Ññ ÂÊİŌŬ âêîô

ABCDĔEFGHIJ KLMNOPQRSTÞ
UVWXYZÆØÅÄÖ abcdĕefghij
klmnopqrstþ uvwxyzæøåäö